

pola

sendependa revuo
de polaj esperantistoj

esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 6/2006 ★ ISSN 0032-2431

"X"
"XXX"
"XXXXX"
"GOD JUL"
"BUON ANNO"
"FELIZ NATAL"
"JOYEUX NOEL"
"VESELE VANOCE"
"MELE KALIKIMAKA"
"NODLAG SONA DHUIT"
"BLWYDDYN NEWYDD DDA"
"BOAS FESTAS"
"FELIZ NAVIDAD"
"MERRY CHRISTMAS"
"KALA CHRISTOUGENA"
"VROLIJK KERSTFEEST"
"FROHLICHE WEIHNACHTEN"
"BUON NATALE-GODT NYTAR"
"HUAN YING SHENG TAN CHIEH"
"WESOLYCH SWIAT-SRETAN BOZIC"
"MOADIM LESIMHA-LINKSMU KALEDU"
"HAUSKAA JOULUA-AID SAID MOUBARK"
"N PRETTIG KERSTMIS"
"ONNZLLISTA UUTTA VUOTTA"
"Z ROZHDESTYOM KHRYSTOVYM"
"NADOLIG LLAWEN-GOTT NYTTSAR"
"FELIC NADAL-GOJAN KRISTNASKON"
"S NOVYM GODOM-FELIZ ANO NUEVO"
"GLEDILEG JOL-NOELINIZ KUTLU OLSUM"
"EEN GELUKKIG NIEUWJAAR-SRETAN BOSIC"
"KRIHSTLINDJA GEZUAR-KALA CHRISTOUGENA"
"SELAMAT HARI NATAL - LAHINGU NAJU METU"
"SARBATORI FERICITE-BUON ANNO"
"ZORIONEKO GABON-HRISTOS SE RODI"
"BOLDGOK KARACSONNY-VESELE VIANOCE"
"FELICES PASCUAS - EIN GLUCKICHES NEUJAHR"
"ROOMSAID JOULU PUHI -KUNG HO SHENG TEN"
"SZCZĘŚLIWEGO NOWEGO ROKU - WESOŁYCH ŚWIĄT"
"FELIĈAN NOVAN JARON"

XXXXXX
XXXXXX
XXXXXX
XXXXXX

6

2006
Jubilea jaro

Enhavtabelo:

3	fino.. <i>Kazimierz Leja</i>
4	La misvojo <i>Fernando Redondo</i>
5	Orhan Pamuk — ĉijara Nobel-premiito <i>Tomasz Chmielik</i>
9	Mi nomiĝas Ruĝo (fragmento) <i>Orhan Pamuk (Tomasz Chmielik)</i>
13	Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto (parto unua) <i>Claude Piron</i>
19	Preskaŭ ĉio pri la prepozicio POST <i>Czesław Baranowski</i>
21	ARKONES: post la sukcesa aranĝo <i>Lidia Ligęza</i>
23	Miaj impresoj pri la prelego... <i>Ela Karczewska</i>
24	UK 2009 — konciza raporto <i>Jarosław Parzyszek</i>
26	Infanoj el Pollando malkovris Parizon kaj Belgion <i>Elizabeta Barbay</i>
28	Elsendoj de Pola Radio minacitaj! <i>Barbara Pietrzak, Renato Corsetti</i>
32	Pola kulturo eksterlande — Argentino <i>Agnieszka Machota</i>
34	GRUPE-10 <i>Stanisław Mandrak</i>
35	Kontribuo de William Auld al Esperanto-teatro <i>Zofia Banet-Fornalowa</i>
36	ILEI-informoj <i>Maria Majerczak</i>

Pola Esperantisto
sendependa revuo de polaj
esperantistoj. Aperas 6 fojojn jare.
N-ro 6/2006 — ISSN 0032-2431
eldonkvanto (naktad): 260 ekz.

Redaktas: Tomasz Chmielik, Kazimierz LEJA (ĉefredaktoro), Lidia Ligęza. Konstantaj kunlaborantoj: Czesław Baranowski, Danuta Kowalska, Teresa Nemere, Stanisław Śmigielski.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj kontribuojn sendu al la Eldonejo HEJME:

TTT-paĝo: www.hejme.com.pl

Retpoŝto: hejme@hejme.com.pl

Tel.: (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

La redakcio rezervas al si rajton mallongigi kaj korekti la tekstojn.

Jarabono enlanda: 30,00 PLN pagenda al: Wydawnictwo Hejme, PL 41-250 Czeladź, str. Wąska 21, skrytka 59
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

Jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al: UEA-konto: <kazl-s>. EU-abonantoj povas pagi ankaŭ al la supra banko-konto. Por aerpoŝta sendado aldonu 6 EUR. Nepre informu eldonejon pri via pago!

fino...

... de la jaro, pri kiu oni povas diri: abunda je okazintaĵoj gravaj, ne ĉiam tamen gajaj kaj esperigaj — venas.

Kaj kvankam ni ne konas ĝis nun rimedojn haltigi la fluantan tempon, ni ja scipovas pleniĝi ĝin per agoj, kiuj igos la pasantan tempon bone utiligita, sukcesa. Mi ne diras tion kiel teoretikulo. Eldonejo HEJME, kiun mi gvidas de la jaro 1991, prenis respondecon i.a. pri eldonado de *Pola Esperantisto* antaŭ preskaŭ 5 jaroj. Komence kun 90 abonantoj, nun kun pli ol 260, la revuo havis siajn „malbonajn tagojn”, precipe tiam, kiam publike kaj oficiale iuj personoj malinstigadis ĝin aboni aŭ informis pri ĝia neekzisto. Mi ne revenus al al temo (tuŝita jam sur paĝoj de PE), se ne venus al mi novaj sciigoj, ke la samo plu okazas. Dankon, esperantistoj!

Pri eĥoj de aliaj gravaj okazintaĵoj pasantaj vi povos legi ĉi-numere. Lastatempe, la plej grava internaciskskale evidentiĝis la decido de gvidantoj de Pola Radio fini la esperantlingvajn elsendojn de Radio Polonia. Okazis jam unuaj maldungoj, kaj kiam mi skribas tiujn ĉi vortojn, ne estas ankoraŭ konata la fina rezulto de tutmonda, esperantista malaprobo al tiu ĉi decido, esprimita per multaj leteroj al la gvidantoj de PR, al polaj ambasadejoj, kaj eĉ al la prezidento de Pollando, sendita de la pre-

zidanto de UEA, Renato Corsetti.

Alia fenomeno de la pasanta jaro evidentiĝis internaj problemoj de pola Esperanto-movado, precipe kva-zaŭa „atako” de homoj ekstere de Pola Esperanto-Asocio al ĝiaj gvidantoj. Mi kun bedaŭro devas konstati, ke „pola inferno” disvolviĝas interne de la Asocio, sen „eksteraj atakoj”. Oni povas nur bedaŭri, ke ne sufiĉas por kelkaj aktivuloj kuraĝo eldiri publike tion, kion ili parolas kaŝe. Sana kritiko povus nur helpi venki malfacilaĵojn kaj elvoki deziratan **esencan** diskuton pri problemoj, ne pri personoj. Eble tiurilate mi estas troa optimisto, tamen mi persone plu kredas, ke tio eblas.

Al ĉiuj legantoj de *Pola Esperantisto* mi deziras pli bonan Novan Jaron, dediĉante speciale du erojn en la kuranta eldono de PE: la versaĵon (ĵus ricevitan) sur la 4a paĝo, kaj tre valoran, pensigan kaj instigan artikolon de Claude Piron (p. 13).

Ni provu elekti venontjare pli bonajn gvidantojn, anstataŭ kritiki la nunajn. Bone estus, se ĉiuj elektoj antaŭigu esenca, senigita de personaj akuzoj, diskuto. Ni montru unue al ni mem, ke ni scipovas zorgi pri komuna bono kaj agi komune. Eble tiam la „ekstera mondo” rimarkos, ke esperantistoj havas ion vere valoran ankaŭ por ili.

La misvojo

Himno de la pesimistoj

Dediĉita al la homoj, kiuj ĉiam plendas, sed nenion faras.

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Al kiu la lingvo rapidas;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan disfalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
ĉar ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron.
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la ilo, en ĉiu momento,
Per kiuj ni provas, verŝante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.

Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj pasintaj pensante;
Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,
Ni plendas kaj plendas konstante.
„Laboru kaj fidu!” La homoj nin petas,
„Neniam!” en ĥoro ni krie ripetas,
Obstine gruntante — neniu nin dankos,
Sed tamen la plendoj ne mankos.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkintajn foliojn disŝetas,
Ni helpas la venton, kaj refortigitaj,
Ni plenan disfalon profetas.
Eĉ kiam la krizo jam estas pasinta,
Kaj fido en koron denove veninta,
Obstine ni tudas per malpropagando
La homojn tra tuta la lando.

Fernando Redondo (Hispanujo)

Tomasz Chmielik

Orhan Pamuk — ĉijara Nobel-premiito



En 2006, Sveda Reĝa Akademio aljuĝis la Nobel-premion al turka verkisto Orhan Pamuk, ĉar „serĉante la melankolian animon de sia familia urbo li malkovris novajn simbolojn pri kunpuŝiĝo kaj reciproka interpenetrado de kulturoj”.

Orhan Pamuk naskiĝis la 7an de junio 1952 en Stambulo, kie li ne nur loĝas kun siaj edzino kaj 15-jara filino, sed ankaŭ ŝpinas la intrigon de siaj romanoj. Tiu mirinda urbo ĉe Bosforo estas por li sama kiel Dublin por James Joyce. Pamuk migrigas siajn legantojn tra stratoj kaj kvartaloj de Stambulo — la nova, konata el la paĝoj de turismaj gvidlibroj, kaj la malnova, kiam ĝi ankoraŭ nomiĝis Konstantinopolo. Iam li mem diris: „La destino de Stambulo estas mia destino. Mi estas kunigita kun tiu ĉi urbo, ĉar ĝi faris min tio, kio mi iĝis”.

Li devenas el riĉa familio. Lia avo riĉiĝis ĉe konstruado de fervojoj, lia patro estis inĝeniero dungita en la unua turka filio de IBM. Unu el la onkloj studis medicinon en Usono kaj estis poste laboranta kiel kuracisto. Certe lia familio reprezentas tiun parton de la nacio, kiu subtenis entuziasme socialajn reformojn de Mustafa Kemal Atatürk, kreinto de la moderna turka ŝtato. Sed tra la fenestroj de la familia domo en la kvartalo

Nizantaŝi juna Orhan vidis alian Turkion, kie la osmana imperio postlasis firmajn spurojn. 15-jara, li komencis pentri kaj estis konvinkita, ke li fariĝos pentristo. En 1970, laŭ familia tradicio, li ekstudis arkitekturon en la stambula Teknologia Instituto. La arkitekturajn studojn li tamen ne finis kaj venis en la universitaton, kie en 1977 li magistriĝis kiel ĵurnalisto.

En 1982, li debutis per la romano *Cevdet Bey ve Ögullari* (Sinjoro Cevdet kaj liaj filoj), kiu estas familia sagao en la stilo de *Buddenbrookoj* de Thomas Mann. Ĝi prezentas tri generaciojn de Stambulaj loĝantoj.

Tri jarojn poste li aperigis la novan romanon *Beyaz kale* (Blanka kastelo), por kiu li ricevis en 1990 anglan *Independent Foreign Fiction Prize*. La intrigo de la romano okazas en la 17-jarcenta Stambulo, kaj la heroo — juna itala sciencisto — migrante de Venecio al Napolo estis forkaptita kaj iĝis sklavo de riĉa, sed klera turko. Li instruas al sia mastro la okcidentan mondon, kaj interŝanĝe li ricevas ampleksan sciadon pri Oriento. *Beyaz kale* famiĝis tra la mondo. John Updike laŭdis en *The New Yorker* la turkan aŭtoron, ke atentokapte li prezentis la opozicion inter „fataleca religio kaj agresema scienco”.

Samjare, kiam aperis *Beyaz kale*,

Turkujon vizitis Arthur Miller kaj Harold Pinter (pasintjara Nobel-premio), kaj Orhan Pamuk akompanis du verkistojn dum ilia migrado tra la Bosfora metropolo.

En 1988 li forveturis en Usonon kiel partoprenanto de University of Iowa's International Writing Program. Dum sia restado en Columbia University li ekverkis sian trian romanon *Kara kitap* (Nigra libro, 1990) pri la moderna Stambulo. Ĝi havas formon de labirinto, kaj ĝia heroo estas fotisto serĉanta virinon, al kiu li enamiĝis. En 1991 reĝisoro Ömer Kavur sukcese filmigis ĉi romanon.

En la romano *Yeni hayat* (Nova vivo) junulo, kies pensojn ŝanĝis iu tra-legita libro, forlasas sian ĝisnunan vivon kaj faras busvojaĝon tra Turkio. La graveco de ĉi tiu verko konsistas en tio, ke Orhan Pamuk provis malklaŝe paroli pri la situacio de la kurda minoritato.

La plej granda sukceso de Pamuk estis romano *Benim adim Kirmizi* (Mi nomiĝas Ruĝo, 1998). Dum tri semajnoj post ĝia apero oni vendis 85 milojn da ekzempleroj. La intrigo okazas en la 16a jarcento. Tial la verkisto devis fari kelkjarajn studojn pri arto, historio kaj literaturo de sia patrujo. Kiel spiritajn gvidantojn pri la konstruo de *Benim adim Kirmizi* li elektis tiajn eŭropajn verkistojn kiel Thomas Mann, Italo Calvino, Umberto Eco kaj Marguerite Yourcenar. La romano povas esti legata kiel tradicia amromano, sed ankaŭ kiel filozofia parabolo aŭ mistikaĵo. En ĉiu el 59 ĉapitroj ŝanĝiĝas la rakontanto — in-

ter aliaj parolas hundo, arbo, mortinta pentristo—miniaturisto kaj lia murdinto. *Benim adim Kirmizi* prezentas eventojn okazintajn dum la regado de sultano Murat la IIIa en Stambulo, en 1591. La ĉefan heroon post multjara vojaĝo tra Persujo kaj plej malproksimaj urboj de la imperio alvokis hejmen lia onklo Eniŝte Effendi, majstro pri manuskriptoj transdonataj al la sultano kaj patro de la knabino, al kiu li malpermesis edziĝi kun la nevo amanta ŝin. Tiu nevo estas unu el la miniaturistoj de la sultano, pentranta ilustraĵojn por malnovaj verkoj. Kune kun aliaj kvar pentristoj oni dungis lin por la sekreta projekto de la sultano. Ilia tasko estos ilustrati libron en la venecia stilo, preparatan okaze de miljaroj, post kiam Mahometo forkuris de Mekko al Medino.

En 2002 aperis romano *Kar* (Neĝo), kaj en la aldono al *New York Times* pri libroj oni rekonis ĝin kiel plej bonan eksterlandan verkon, aperintan en Usono dum 2004. Kun precipa intereso akceptis ĉi romanon germanaj legantoj, al kiuj ĝi malfermis la okulojn pri homoj, lokoj kaj problemoj evitataj ĝis nun. La heroo de *Kar* estas poeto Ka, *outsider* vivanta inter Germanio kaj Turkio. Li venis al la urbo Kars situanta en la montaro de Anatolio, proksime al la limo kun Armenujo. Sin mortigis tie — estas la reala okazaĵo, kaj ne literatura fikcio — multaj knabinoj, kiujn oni forigis el la lernejo, ĉar la aŭtoritatoj malpermesis portadon de tuko. Al tiu ĉi urbo — meze de ĉi tiuj eventoj — venis el Stambulo poeto Ka. 12 jarojn li

pasigis kiel elmigrinto en Germanujo, kie li studis eŭropan literaturon, kiun li taksas alte, sed li mem ne skribas, ĉar elsekiĝis la fonto de lia inspiriĝo. Oni taskigis skribi al li raporton pri la okazantaj sinmortigoj. Li komenkas propran esploron. Dume neĝo, falanta dense, izolas la urbon for de la cetera mondo. Baldaŭ, en la urba teatro, dum la spektaklo gloriganta reformojn de Atatürk, aŭdiĝas pafoj. Ka rigardas tiun konflikton inter adeptoj de laika ŝtato kaj islamistoj. Li klopodas ĉiel trovi respondon al la demando, kial ĝi okazas. Li alparolas siajn malnovajn amikojn, pro kio ne interesas ilin Okcidento, kaj ilia sola respondo, kiu aŭdiĝas, estas „ne, ĉar ne”. Li povas ekligi nenian dialogon. Kaj super ĉio dancas neĝflokaj, kiuj blanke kovras malbelajn murojn de la urbo kaj homajn vizaĝojn. Tiam la realo fariĝis subite alia, sed tio ne signifas, ke pli bela. Kompreneble neĝo ne kovras la plej grandajn teruraĵojn: politikan murdon, suicidojn, mensogojn, kaj en tiu leviganta ondo de teroro Ka trovis grandan amon kaj ekverkis post jaroj de silento. Pamuk parolas laŭte kaj malkaŝe pri la okazanta, li ne provas malaltigi valoron de la kulturo de Oriento, nek demonigi la kulturon de Okcidento. Li deziras konservi distancon al la mondo kaj plene ekvilibrigi siajn opiniojn. Restis nur la malgaja konstato, ke la leganto ne ekscios ĝis la fino, ĉu Ka denuncis la gvidanton de islamistoj, kiu kaŝiĝis antaŭ la polico. Sed kelkajn jarojn poste oni trovis la kadavron de Ka sur frankfurta strato. Li estis

mortpafita. En la romano *Kar* oni vidas la plej belan flankon de la Pamuka prozo — sendepende de politikaj opinioj li estimas kaj provas kompreni ordinarajn homojn.

En la lasta romano *Stambul* (2003) Orhan Pamuk pentras nostalgian bildon de sia familia urbo, kaj en ĝia fono rememoroj pri la infanaĝo de la aŭtoro kunplektas sin kun rakontoj pri verkistoj, iam vizitintaj ĉi lokon (ekz. Flaubert).

Kiel metaforon de la propra verkado li trovas la ponton, kiu kunigas du bordojn de Bosforo. Li sentas sin tiel, kvazaŭ li estus staranta meze de la ponto, apartenante nek al la eŭropa, nek al la azia parto de Turkio, sed ambaŭ postlasas spurojn en liaj romanoj.

En 2005 li ricevis tre prestiĝan *Friedenspreis des Deutschen Buchhandels*.

Oni ne forgesu, ke Pamuk ricevis la Nobel-premion ankaŭ pro la kuraĝo paroli veron pri Turkio. Ofte li eldiras siajn opiniojn pri gravaj politikaj temoj. Volonte li engaĝiĝas en batalon pri homaj rajtoj. En 1989, kiam ajatolaho Ĥomeini ĵetis fatvon sur Salmanon Rushdie, ĉar li senhonorigis islamon, Orhan Pamuk kiel unua verkisto el muzulmana lando, publike esprimis sian opinion defende por la aŭtoro de *Satanaj versoj*. Decembre de 1998 li rifuzis akcepti la titolon de „ŝtata artisto”. Li pravigis tiun decidon jene: *Dum jaroj mi kritikis la ŝtaton pro malliberigado de verkistoj, kion diktas naciismo, por solvi la kurdan konflikton perforte.*

En 2005 oni aldonis al la turka punkodo artikolon 301: *Ĉiu, kiu rekte ofendas la turkan dignon, la Respublikon aŭ Nacian Turkan Asembleon, riskas esti kondamnita al malliberigo de 6 monatoj ĝis 3 jaroj.*

Ĝuste pro tiu fama artikolo 301 la turka registaro akuzis samjare Pamukon pri kalumnioj kontraŭ Turkio kaj faris proceson. La rekta kaŭzo estis liaj vortoj el la intervjuo donita al la svisa revuo *Das Magazin*, februare de 2005: *Tridek milojn da kurdoj kaj milionon da armenoj oni mortigis sur tiu ĉi tero kaj neniu kuraĝas paroli pri tio.* Tra la turkaj gazetoj ruliĝis ondo da malamo al la verkisto. Li devis forveturi eksterlanden, sed kelkajn monatojn poste li rehejmiĝis, por antaŭ la tribunalo prezenti siajn opiniojn. En la intervjuo por BBC News li diris, ke li volas defendi liberecon de parolo, kiu estas nura savilo por Turkio, se ĝi volas fermi terurajn paĝojn de la propra historio. *Tio, kio okazis pri loĝantoj de Armenujo en 1915, estis vero profunde kaŝata antaŭ la turka nacio. Ĝi estis tabuo. Kaj ni devas ja lerni interparolon pri la pasinteco — konstatis Pamuk.*

Oktobre 2005, kiam oni transdonis al li premion en la Frankfurta librofiro li deklaris: *Mi ripetas tion, kion mi jam diris laŭte kaj klare: milionon da loĝantoj el Armenujo kaj tridek milojn da kurdoj oni mortigis en Turkio.* Responde al tiuj vortoj oni bruligis liajn librojn sur la stratoj de Turkio, sed ankaŭ en Germanio, en la kvartaloj de la urboj kun turka loĝantaro.

Decembre 2005 oni nuligis la aku-

zon pro ofendo de la turka aermeo, sed oni subtenis la akuzon pri ofendo de Turkujo (turkeco). Tamen la proceso kontraŭ Pamuk ne finiĝis per kondamna verdikto, ĉar la 22an de januaro 2006 la juĝisto malakceptis la akuzon sekve de protestoj en la tuta mondo. Eŭropa Parlamento intencis sendi observanton al Stambulo, *Amnesty International* aranĝis pledan kampanjon je Pamuk, kaj la plej eminentaj verkistoj, kiel Umberto Eco, Carlos Fuentes, Juan Goytisolo, Günter Grass, Mario Vargas Llosa, Gabriel Garcia Marquez, Jose Saramago kaj John Updike publike solidariĝis kun la verkisto.

Ok romanoj de Orhan Pamuk estis tradukitaj en pli ol 40 lingvojn kaj aperis en 2 milionoj da ekzempleroj.

Ĉefa problemoj en la verkoj de Pamuk estas rilatoj inter Turkio kaj Okcidento, manifestiĝantaj sur la linio: amo — malamo. Malgraŭ la fabula kaj stila diverseco, ĉiujn ĉi verkojn kuniĝas du ripetiĝantaj temoj: la problemoj de identeco (kiagrade individuo aŭ nacio povas resti fidela al si, samtempe malfermante sin je fremdaj influoj) kaj la problemoj de reprezentado (ĉu la arto povas en vera maniero bildigi la realon kaj ĝis kia grado la artisto povas esprimi proprajn opiniojn kaj personecon en sia verkaro) — rimarkis Michael McGaha en Los Angeles Times Book Review kaj tio estu konkludo por mia eseo.

La suba ĉerpaĵo el *Benim adim Kir-mizi* estas unua traduko el la Pamuka romano en Esperanton.

Tomasz Chmielik

Orhan Pamuk

el la romano *Mi nomiĝas Ruĝo* (Benim adim Kirmizi)

Dekdu jarojn poste, kiam mi estis for de mia hejmo, mi revenis kiel lunatiko al Stambulo. „La tero alvokis lin”, oni diras pri tiuj, kiuj baldaŭ mortos, sed min la morto venigis al la urbo, kie mi naskiĝis kaj kreskis. Komence mi pensis, ke pro la morto, sed poste mi komprenis, ke gravas ankaŭ la amo. Tamen ĝi ŝajnis io tiel mallara kaj malnova kiel miaj rememoroj. Ĉuste en Stambulo, dekdu jarojn antaŭe, mi enamiĝis al mia onkla fratino — tiam ŝi estis infano.

Kvar jarojn poste, kiam unuafoje mi foriris de Stambulo, disportante leterojn kaj kolektante impostojn, tramigrante vastajn stepojn, neĝblankajn montojn kaj melankoliajn persajn urbojn, mi certigis min, ke iom post iom mi forgesas la vizaĝon de mia karulino el la infana tempo. Mi maltrankviliĝis kaj provis rememori ĝin, sed mi komprenis, ke — eĉ se mi ne scias, kiom forte mi estus amanta — la vizaĝo nevidita delonge malaperas el la memoro. Dum la sesa jaro, pasigita en la oriento, vojaĝante aŭ laborante kiel sekretario en la servo al paŝaoj, mi konvinkiĝis, ke la vizaĝo de mia karulino ne plu estas sama kiel tiu reala el Stambulo. Ankoraŭ pli malbone estis ok jarojn poste, kiam tri-deksesjara mi revenis al mia amata urbo kaj konstatis kun doloro, ke la rememoro pri la karulino tute perdiĝis el mia memoro.

Plej multaj el la amikoj kaj parencoj forpasis dum tiuj dekdu jaroj. Mi iris al la tombejo, de kie etendiĝis vido al la golfo Ora Korno, por viziti la tombojn de mia patrino kaj kuzoj mortintaj dum mi estis for de la hejmo. Mi preĝis je ili. La odoro de la kotoza tero liberigis en mi rememorojn. Iu disrompis argilan kruĉon, starantan sur la tombo de mia patrino. Rigardante ĝiajn pecojn, mi ne scias, kiam mi ekploris. Mi malesperis funebre pro la mortintaj proksimuloj aŭ ĉu tial, ke post ĉiuj ĉi jaroj mi troviĝis pro stranga hazardo en la komenco de mia vivo? Kaj probable estis inverse — mi ploris, ĉar mi sentis, ke mia vojaĝo tra la vivo finiĝos jam baldaŭ? Ekneĝetis. Ĉirkaŭita per maldense falantaj neĝflokaj tiel mi enpensiĝis pri komplikaj vojoj de mia vivo, ke mi ne vidis nigran hundon gapi al mi el malluma angulo de la tombejo.

Larmoj ne plu ruliĝis el miaj okuloj. Mi viŝis la nazon. Kiam mi eliris el la tombejo, mi rimarkis, ke la hundo amike vestumas al mi. Iom poste, en la kvartalo, kie mi kreskis, mi luprenis domon iam okupatan de iu parenco de la patra flanko. Al la domposedantino mi rememorigis ŝian filon, kiun safavidaj soldatoj mortigis dum milito kaj ŝajne nur pro tio ŝi konsentis ordigi miajn ĉambrojn kaj kuiri al mi.

Mi faris longajn promenojn, kvazaŭ neniam ĝis nun mi estus loĝanta en Stambulo, sed en araba urbo ie en la mondfino. Ĉu stratoj fariĝis pli mallarĝaj aŭ estis nur mia impresio? Kelkloke, sur la stratetoj inter klinitaj domoj mi devis alpremiĝi al pordoj kaj muroj, por ne kunpuŝiĝi kun ĉevaloj ŝarĝitaj peze. Ĉu multiĝis riĉuloj aŭ nur tiel ŝajnis al mi? Mi rimarkis kaleŝon grandan kiel fortikaĵo, posttiratan de fieregaj ĉevaloj, kian oni povus vane serĉi en Arabio aŭ Persio. En Ĉemberlitaŝ, en la odoraĉo fluganta de la Kokina Bazaro, mi ekvidis amason da tedaj almozuloj vestitaj per ĉifonoj. Iu estis blinda kaj ride-tis, kvazaŭ admirante kirliĝantajn neĝflokojn.

Ŝajne mi ne ekkredus, se oni dirus al mi, ke antaŭ longe Stambulo estis pli malriĉa, pli malgranda, sed ankaŭ pli feliĉa urbo, sed ĝuste tion sentigis al mi la koro. Kvankam la domo de mia karulino staris en la sama loko, inter tiliarboj kaj kaŝtanujoj, sed — kiel oni sciigis min ĉe la pordeto — loĝas tie iu alia. La patrino de la karulino, kaj mia onklino, forpasis, kaj ŝia edzo, mia Eniŝte, transloĝiĝis kun la filino. Probable diversaj malfeliĉoj falis sur iliajn kapojn, kiel diris loĝantoj, kiuj malfermis la pordon antaŭ mi. Fremdaj homoj en tiaj situacioj estas tre liberaj kaj babilas tion, kion salivo alportos sur langon, eĉ ne imagante, ke ili povas vundi ies koron, kaj eĉ detruiri revojn. Nun mi ne parolos longe pri tio, mi diras nur, ke kiam mi rememoris varmajn, sunajn, verdajn tagojn, pasigitajn en tiu malnova ĝardeno, antaŭ la okuloj mi havis glaciojn kiel malgranda fingro, pendantajn ĉe branĉoj de la tilio en la malzorgita, neĝplena loko, kiu pensigis min nur pri morto.

Iom el tio, kio okazis al miaj kuzoj, mi ekkonis per letero de Eniŝte, sendita al Tabrizo. Li invitis min en Stambulon, li skribis, ke sekrete li preparas manuskripton por nia sultano kaj deziras, ke mi helpu lin, ĉar li aŭdis, ke iam mi ornamadis librojn por osmanaj paŝaoj, guberniestroj kaj loĝantoj de Stambulo. Dume en Tabrizo, per mono sendata de la klientoj el Stambulo, kiuj mendis librojn, mi serĉis lokajn miniaturistojn kaj kaligrafojn plendantajn kontraŭ milito kaj osmanaj soldatoj, sed ili ankoraŭ ne forveturis al Kazvin aŭ en alian persan urbon. Mi farigis iluminon ĉe ili kaj bindigis librojn, kiujn poste mi sendis al la mendintoj. Se junaĝe Eniŝte ne transdonus al mi ŝaton por iluminado kaj belegaj libroj, neniam mi akceptus tian laboron.

En la angulo de la strato kondukanta al la bazaro, ĉe kiu iam loĝis mia Eniŝte, mi trovis barbiston en la sama ejo, inter speguloj, raziloj, kruĉoj kaj penikoj. Tra vitro en la fenestro niaj rigardoj renkontiĝis, sed mi ne scias, ĉu li rekonis min. Mi ekĝojis, vidante la ujon por kapolavo, pendantan ĉe la plafono sur ĉeno, balanciĝi same kiel iam — antaŭen kaj malantaŭen — kiam la barbiŝto enverŝis varmegan akvon.

Iuj urbopartoj kaj stratoj, konataj por mi el la junaĝo, malaperis en cindro kaj fumo de furiozaj incendioj, ŝanĝiĝante en ruinojn kaj brulnigran restaĵon, kie ariĝis senhejmaj hundoj, kaj frenezuloj terurigis infanojn. Sed en aliaj lo-

koj, kiujn ankaŭ detruis flamoj, estis konstruitaj mirinde luksaj rezidejoj. En la fenestrojn de iuj domoj oni metis multekostajn pecojn el kolora venecia vitro. Oni starigis ankaŭ multe da riĉaj duetaĝaj domojn kun korbelfenestroj super la sveltaj muroj.

En Stambulo, kaj ankaŭ en aliaj urboj, la mono perdis sian valoron. Kiam mi forveturis al la oriento, kontraŭ unu akco oni bakis grandan panobulon, kiu pezis kvarcent dirhemojn, sed nun kontraŭ la sama prezo la bakistoj vendadis bulojn duone pli malpezajn, krome ilia gusto tute ne estis sama kiel infanaĝe. Se mia kara patrino povus ĝisvivi la tempon, kiam oni devus pagi tri akcojn kontraŭ dekdu ovojn, certe ŝi dirus: „Estas necese por ni forveturi en alian landon, antaŭ ol kokidoj freneziĝos tiel, ke ili fekos al ni sur la kapon ol sur la teron”. Tamen mi komprenis, ke la valoro de la mono malgrandiĝas ĉie. Onidire komercaj ŝipoj, venantaj el Nederlando kaj Venecio estis plenaj de kofroj kun moneroj sen valoro. Antaŭ longe, en la monfarejo, el cent dirhemoj da arĝento oni stampis kvincent akcojn, kaj nun pro senfinaj militoj kontraŭ Safavidoj — okcent. Kiam janiĉaroj malkovris, ke la moneroj pagataj al ili, naĝas sur la akvo de la golfo Ora Korno kiel sekigitaj fazeoloj, kiuj falis de vendobudo kun legomoj en la haveno, ili ekribelis kaj sieĝis la palacon de nia sultano, kvazaŭ ĝi estus fortikaĵo de malamikoj.

La hodĵo, kiu nomiĝis Nusret, predikanta en la moskeo Bejazit kaj diskoniganta, ke li venis el la gento de Profeto Mahomet, famiĝis ĝuste en la tempo de moralperdo, multekosteco, murdoj kaj rabado. Tiu predikisto, naskiĝinta en Erzurum, klarigis la malfeliĉojn falintajn sur Stambulon dum la lastaj dek jaroj — brulegojn en la kvartaloj Bahĉekapi kaj Kazandĵilar, peston, kiu forpasis ĉiufoje milojn da homoj, senfinajn militojn kontraŭ Safavidoj, postlasantajn amasegon da viktimoj kaj batalojn pri malgravaj osmanaj fortikaĵoj kun ribelintaj kristanoj — per tio, ke muzulmanoj forlasis la vojon de Profeto Mahometo, ne obeis ĉiujn ordonojn de la Korano, estis pli toleremaj al kristanoj, ke ili faris malkaŝan komercon per vino, kaj viroj el religiaj frataroj pasigis tempon en tekkoj amuziĝante.

Vendisto el la budo kun legomaj marinaĵoj, rakontante al mi ekscite novaĵojn pri la hodĵo veninta de Erzurum, diris, ke la mono, perdanta sian valoron — novaj dukatoj, falsitaj nederlandaj guldenoj kun leono kaj osmanaj akĉoj, ĉiutage kun malpli da arĝento — kaj supersūtanta bazarojn kaj vendoplacojn, kondukos al falo, post kiu estos malfacile leviĝi. La vendisto ankaŭ diris, ke diversaj friponoj kaj ribeluloj amasiĝas en kafejoj kaj komplotas dum noktoj. Tiuj mizeruloj kun suspektinda deveno, frenezaj opiofumantoj kaj savitoj el la sekto nomata *kalenderi* — insistante ke ili sekvas la vojon de Alaho — pasigis vesperojn malantaŭ la muroj de tekkoj, ili dancis kun muziko ĝis mateno, ili enbatis al si pinglojn en diversajn lokojn sur la korpo kaj diboĉis ofte kun junaj knaboj.

Mi ne sciis, ĉu pro dolĉaj liuto-sonoj, enfalantaj en miajn orelojn aŭ pro rememoroj kaj revoj mi jam ne povis aŭskulti grumbladon de la vendisto de marinaĵoj kaj tial, sen pensi multe, mi leviĝis kaj iris post la muziko aŭdiĝanta de malproksime. Se vi amis iun urbon kaj promenis multe tra ĝi, via korpo, kaj ankaŭ la animo, lernas reton da stratoj, tiel ke en la momento de malĝojo, kiam neĝetas triste, la piedoj mem portos vin al la plej kara monteto.

Guste laŭ tiu maniero, elirinte el la Bazaro de Forĝistoj, mi haltis ĉe la moskeo Sulejmanije, por rigardi, kiel neĝo falanta sur la Oran Kornon, jam kovris tegmentojn de la domoj turnitaj al nordo kaj kupolojn blove frapatajn de nord-orienta vento. La mallevataj veloj de la ŝipo, kiu veturis en la havenon, salutis min flirte. Ilia koloro estis en harmonio kun plumba nebulo ŝvebanta super la Ora Korno. Cipresoj kaj platanoj, tegmentoj, vespera agordo, voĉoj el la malsupre troviĝantaj kvartaloj, vokoj de vendistoj kaj krioj de infanoj ludantaj sur la korto de la moskeo kunmiksiĝis en mia kapo kaj certigis min, ke nur ĉi tie mi kapablos vivi. Subite mi ekpensis, ke denove mi rememoros la vizaĝon de mia amatino, kiun jam de jaroj mi ne povis imagi.

Mi iris malsupren de la monteto kaj perdiĝis en amaso da homoj. Post la vespera voko al la preĝo mi manĝis ĝissate ĉe vendisto de kolbasoj. En la malplena ejo mi aŭskultis kun atento rakontojn de la posedanto, kiu rigardis ame, kiel mi manĝas, kvazaŭ li estus nutranta sian katon. Poste li klarigis la vojon, kaj mi iris mallarĝan straton post la Bazaro de Sklavoj — la ĉirkaŭaĵo jam dronis en nokta mallumo — kaj mi trovis kafejon, kiun mi rememorigis dum babilado kun la gastejestro.

Tie sidis multe da homoj kaj estis varmege. Medaho, popola rakontanto, tia, kiajn mi vidis en Tabrizo kaj aliaj persaj urboj (kie ili estis nomataj *perdedar*), sidiĝis sur la podion apud la fajrujo, poste li dismetis kaj pendigis sur la muron, antaŭ la gastoj, desegnaĵon pri hundo, rapide, sed lerte pentritan sur dikan paperon kaj de tempo al tempo montrante sian malgrandan bildon li aŭdigis rakonton laŭ hunda vido.

Esperantigis Tomasz Chmielik

Avo Frosto

Saluton!

Mi informas, ke oni povas skribi al Sankta Nikolao ankaŭ en Esperanto. La kanada poŝto promesis zorgi pri tio, ke leteroj, sendotaj al S-ta Nikolao ne pereu ie sen eĥo.

Jam de multaj jaroj oni respondas tiuspecajn leterojn en pli ol 20 lingvoj

de la mondo. De antaŭnelonge oni akceptas ankaŭ la leterojn Esperante. Oni devas skribi mane (nek komputile, nek maŝin-skribe!) je la adreso:

Avo Frosto

Norda Poluso

HOH OHO

Kanado – Canada.

Informis: Andrzej Kiszkiel

Claude Piron

PSIKOLOGIAJ ASPEKTOJ DE LA MONDA LINGVOPROBLEMO KAJ DE ESPERANTO

Parto unua

(Prelego prezentita de Claude Piron en Bazelo dum la Trilanda Renkontiĝo la 21^{an} de marto 1998. Aperas kun la afabla permeso de la aŭtoro).

Oni povas aliri la mondan lingvoproblemon laŭ tre diversaj vojoj, ekzemple politika, lingvika, financa-ekonomia, ktp. Mi aliĝos ĝin, verŝajne pro profesia misformiĝo, el la psikologia vidpunkto, kies graveco, mia opinie, ne estas ĝuste taksata.

Esperantistoj ofte plendas, ke la mondo ne komprenas ilian vidpunkton, ne interesiĝas pri ĝi, aŭ ke nia afero ne progresas sufiĉe rapide. Ili facile kulpigas pri tio unu la aliajn. Miaopinie, tiuj negativaj sentoj tute ne estas pravigeblaj, se oni konsideras la psikologian aspekton de la situacio. Alivorte, laŭ mi, Esperanto tute normale progresas, eĉ kiam ĝi malprogresas dum jardeko, kaj ankaŭ la konsciiĝo pri la monda lingvoproblemo antaŭeniras je normala ritmo, t.e. je la ritmo de historio.

La disvastigita ideo, en la esperantistaro, ke la afero ne progresas sufiĉe rapide fontas el unu el la plej gravaj eroj de la homa psiko, nome deziro. Ni deziras, ke Esperanto progresu, kaj ni reagis al tiu deziro kiel eta infano: ni ne volas vidi la amplekson de la obstakloj, kiuj staras kiel ba-

rilo inter nia deziro kaj ĝia plenumiĝo. Ni do sentas frustron. Kiam ni sentas frustron, anstataŭ fronti al la fakto, ke al ni dekomence realismo mankis, kaj sekve ke la fuŝo kuŝas en ni, ni serĉas kulpulojn ekstere: tiuj estos la cetera mondo, kiu ne atentis nin, aŭ la fuŝuloj en la Esperanto-mondo, kiuj ne agas efike kaj laŭcele. Tio estas infaneca, sed dirante tion mi ne kritikas, mi nur esprimas ion pri la normala funkciado de la homa psiko: kiam aperas forta deziro, ni emas reagigi infanece. Malpacienti pri la progreso de Esperanto, serĉi kulpulojn, estas tute normale kaj nature. Tiel en la plimulto el la kampoj reagis normalaj plenkreskuloj. Ni ja estas maturaj nur pri kelkaj aspektoj de nia vivo. En multaj sferoj, kiel la politika, la metafizika, kaj la homrilata, ni daŭre reagis kiel etaj infanoj.

Nekompreno fare de la socio

Ankaŭ kiam mi diris, ke la mondo ne komprenas nin, mi tuŝis psikologian aspekton de la situacio.

Kial la mondo ne komprenas nin? Ĉar la socio ne komprenas la lingvan situacion ĝenerale. Kial? Pro multaj kaŭzoj. Ekzemple, ĉar lingva rilatado estas io tre kompleksa, kaj ne estas facile kompreni ion kompleksan. Kiam io estas tre kompleksa, la

natura maniero aliri la aferon estas simpligi ĝin. Sekve, la socio ĝenerale havas tre simpligitan bildon pri la lingva situacio en la mondo. Bildon nur skeman.

Alia psikologia kaŭzo, pro kiu la socio ne komprenas la lingvan problemon, estas timo. Tio eble mirigas vin. Kaj efektive, se vi diros al politikisto, aŭ al lingvisto, aŭ fakte al iu ajn surstrate renkontita, ke unu el la kaŭzoj, pro kiuj la mondo ne solvas la lingvoproblemon, estas timo, li aŭ ŝi rigardos vin, kvazaŭ vi estus freneza. Unue, ĉar por la alparolato lingvo-problemo simple ne ekzistas. „La angla solvas ĝin, aŭ la tradukistoj”. Kaj due, se entute estus problemo, estas klare, ke ĝi neniel rilatas al timo. „Neniu sentas timon pri lingvo. Kio estas tiu frenezaĵo?” ŝi aŭ li diros al vi.

Sed multaj timoj estas nekonsciaj. Ni ne sentas ilin, kio estas bona afero, ĉar sen tio estus neeble vivi agrable. Sed fakto restas, ke tiuj timoj kaŭzas multajn fuŝtordojn, misgvidojn en nia maniero kompreni la realon.

Kial lingvo elvokas timon? Refoje, pro multaj kaŭzoj. Ekzemple, lingvo estas ligita al nia identeco. Iun tagon en la infanaĝo ni ekkonscias, ke nia medio parolas tiun aŭ tiun alian lingvon, kaj ke tio difinas nin, rilate al la cetera mondo. Mi apartenas al homa grupo difinita per la lingvo, kiun ĝi parolas. Do, en la profundo de la psiko, mia lingvo estas mi. La vasta uzo de la svisgermanaj dialektoj estas maniero diri: jen kiuj ni estas, ni ne estas germanoj. Aŭ rigardu, kiel reagis la flandroj aŭ la katalunoj: „se oni per-

sekutas aŭ kritikis mian lingvon, oni persekutas aŭ kritikis min”.

Multaj homoj havas forĵetan sintenon al Esperanto, ĉar ili sentas ĝin lingvo sen difinita gento, do lingvo sen homa identeco, do aŭ ne lingvo, aŭ lingvo, kiu estas pli aĝa ol homa, lingvo, kiu estas, rilate al veraj lingvoj, tio, kio roboto estas, rilate al veraj homoj. Kaj tio timigas. Estas timo, ke tiu roboto, pri kiu oni diras, ke ĝi havas ambicion al universaleco, prempaŝos sur ĉiu alia lingvo, sur ĉiu popolo, sur ĉio individua kaj vivanta, detruante ĉion pasante. Tio eble ŝajnas al vi fantazia. Sed estas la vero. La psikologia metodo nomata klinika interparolo, en kiu oni esploras, kiuj ideoj aŭ bildoj asociiĝas unu al la alia, se oni petas personon diri, kio pasas tra la menso deirante de unu difinita vorto, ĉi-kaze „Esperanto”, rivelas la ekziston de tiu nekonscia timo ĉe multegaj personoj.

Identigo al la lingvo internacia

Unu el la problemoj de la esperantistoj devenas de tio, ke Esperanto havas trajton, kiu distingas ĝin de ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj, nome, ke ĝi favoras identiĝon al ĝi. Svedo kiu rilatas angle kun koreo kaj brazilano sentas sin nur svedo kiu uzas la anglan, li ne sentas sin anglalingvano. Kontraste, svedo kiu rilatas per Esperanto kun koreo kaj brazilano sentas sin esperantisto kaj sentas, ke ankaŭ la du aliaj estas esperantistoj, kaj ke la tri apartenas al iu speciala kultursfero. Eĉ se oni ege bone regas la anglan, neanglalingvano ne sentas,

ke tio havigas al li anglosaksan identecon. Kun Esperanto okazas la malo. Kial?

Kiel kutime en la kampo, kiun ni hodiaŭ vizitas, la rolantaj faktoroj estas pluraj kaj kompleksaj, sed eble la plej grava estas, ke Esperanto integriĝas en la homa psiko je nivelo pli profunda ol ĉiu ajn alia fremda lingvo. Ne tuj, ne ĉe komencanto, sed ĉe tiu, kiun Janton nomas „matura esperantisto”, homo kun sufiĉa sperto pri la lingvo por senti sin hejme en ĝi. Kial ĝi situas pli profunde en la psiko? Ĉar ĝi, pli ol iu ajn alia homa lingvo, sekvas la naturan movon de la cerbo ĉe homo, kiu volas esprimi sin.

Nia plej baza tendenco, kiam ni lernas lingvon, estas ĝeneraligi la lingvajn trajtojn, kiujn ni lernis. Tial ĉiuj franclingvaj infanoj diras „des cheval”, „ĉevaloj”, anstataŭ „des chevaŭ”, aŭ „vous faisez”, „vi faras”, anstataŭ „vous faites”. Tial ĉiuj anglalingvaj infanoj esprimas la koncepton „piedoĵ” per „foots” antaŭ ol akiri la ĝustan formon „feet”, aŭ la koncepton „li venis” per „he comed” antaŭ ol akiri la ĝustan formon „he came”. En Esperanto tiaj eraroj ne eblas, do oni rapide sentas sin sekura en la uzo de la lingvo. Krome en e o oni estas multe pli libera ol en aliaj lingvoj. Tio validas pri la maniero rilatigi la vortojn unu al la alia. En la angla vi devas diri, laŭvorte: „li helpas min”, en la franca „li min helpas”, en la germana „li helpas al mi”. En la tri lingvoj ekzistas unu deviga strukturo, nur unu. En Esperanto vi povas libere elekti iun ajn el la tri. Sa-

me estas pri la elekto de la funkcio de vortoj en frazo. Vi ofte povas elekti iun ajn el la adjektiva, adverba, verba kaj substantiva funkcioj, ekzemple diri: „mi venis trajne, mi venis per trajno, mi trajnis”. Ne estas devigo tiurilate. Malmultaj lingvoj disponas la rimedojn, kiuj ebligas tian liberecon, kaj se ili havas ĝin, tre ofte oni ne rajtas ilin uzi. Krome, la Esperanto-medio estas tre tolerema pri gramatikaj kaj vortaraj fuŝoj, en mezuro neniam renkontata alilingve. Forgeso de akuzativo aŭ fuŝa uzo de ĝi estas, praktike, rigardata normala, probable ĉar tio preskaŭ neniam ĝenas la interkompreniĝon. Nur kelkaj pedantoj faras el tiaj eraroj dramon, sed ili situas ekster la normala medio Esperantista. (Atentu! Ne miskomprenu ĉi tiun rimarkon pri lingvaj eraroj kiel rekomendon! Mi situas sur tereno pure observa.) Alivorte, ne estas rilato inter perfekta uzo de la lingvo kaj la sento de identiĝo al ĝi. Oni povas senti sin esperantisto eĉ se oni ĉiufoje preterlasas akuzativon.

Ĉio ĉi, kaj ankaŭ la eblo krei vortojn laŭvole, kion oni ne rajtas fari en multaj lingvoj, kreas etoson de libereco, kiu lokas la lingvon en pli profunda tavolo de la psiko, pli proksime al ties kerno, al ties instinkta bazo. Estas pli facile esti spontana en Esperanto ol en la franca, ekzemple, ĉar oni devas observi malpli da arbitraj malpermesoj. En ĝi do oni sentas sin pli facile si mem. Pro tiaj trajtoj Esperanto fiksiĝas pli profunde en la psiko ol la aliaj fremdaj lingvoj, kaj pro tio oni multe pli emas identiĝi

al ĝi. Sed la homoj, kiuj ne apartenas al la Esperanto-mondo, tion ne povas kompreni. Ili ne komprenas tiun identigon. Tial la sinteno de multaj esperantistoj aperas al ili freneza aŭ almenaŭ tre stranga. Pro tiu sento de identeco kun la lingvo, esperantisto facile sentas sin atakata, kiam oni kritikas la lingvon, aŭ eĉ la ideon mem de internacia lingvo. Ataki la lingvon estas ataki lin mem, kaj la natura reago estas kontraŭataki, kelkfoje tre akre. Sed tion la neesperantisto ne komprenas. Li do vidas en la normala reago de esperantisto ion tro intensan, tro fortan, pruvon de ia fanatikeco, kiu estas la sola ebla klarigo de reago tiel neproporcia.

Du kategorioj

Miaopinie, Esperantistoj psikologie apartenas al du kategorioj. Unuflanke, estas homoj, kiuj nebone adaptiĝis al la kolektiva vivo, kiuj sentas sin iom ekster la fluoj de la modo, de la socio, de la regantaj ideoj kaj manieroj agi. Homoj, kiuj kutimiĝis al la fakto esti malsamaj ol la plimulto aŭ kiuj sentas sin forĵetitaj aŭ forĵetataj de la plimulto. Ne estas facile preni sur sin la fundan solecon de la homa vivo. Tial homoj, kiuj sentas sin malsamaj ol la plimulto, emas kuniĝi, krei kun similuloj komunumon, en kiu ili sentos sin bone. Ili tiam kunvenas kaj rediras unu al la aliaj, kiom pravaj ili estas, kaj kiom malprava la ekstera mondo. Tio estas tute normala kaj homa. Esperanto prezentis al multaj personoj ne bone adaptitaj al la socio lokon por trovi similulojn same

nebone adaptitajn, ĉe kiuj eblis trovi la konsolon kaj plifortigojn necesajn por igi la vivon pli elportebla. Tio estis aparte vera en la periodo, post kiam la unuaj esperoj pri tuja alprenado de Esperanto montriĝis vanaj, kaj antaŭ ol la argumentaro favora al Esperanto iĝis sufiĉe forta kaj fakta, alivorte inter la unua mondmilito kaj la jaroj sepdekaj / okdekaj. Granda parto de la Esperantistaro, tiuperiode, konsistis el neŭrozuloj, t.e. homoj kun psikaj problemoj pli multaj aŭ pli gravaj ol oni trovas ĉe iu ordinara.

Al tiuj neŭrozuloj, al tiuj homoj, kiujn psikaj problemoj kripligis, ni havas grandegan ŝuldon, ĉar sen ili la lingvo simple formortus. Estas naive kaj maljuste rigardi ilin de alte, kiel emas fari kelkaj advokatoj de la Raŭma Manifesto. En la historiaj cirkonstancoj, en kiuj ili troviĝis, tiuj iom sektecaj verdsteluloj necesis, por ke la lingvo disvolviĝu. Normaluloj ne povis interesiĝi pri Esperanto. uzi ĝin kaj do vivteni ĝin. Se Esperanto ne estus konstante uzata, se neniu verkus en ĝi, se ĝi ne utilis en korespondado, kunvenoj, kongresoj eĉ konsistantaj ĉefe el stranguloj, ĝi ne povus disvolvi sian lingvan kaj literaturan potencialon, ĝi ne povus riĉiĝi, ĝi ne povus iom post iom konduki al pli profunda analizo de la monda lingvoproblemo. Mi estas certa, ke post kelkaj jarcentoj, historiistoj konsideros, ke tiuj homoj faris grandegan servon al la homaro, vivtenante la lingvon kaj progresigante ĝin, eĉ se iliaj motivoj parte kuŝis en iu psika patologio.

Apud la neŭrozuloj, la stranguloj, pri kiuj mi ĵus parolis Esperanto allogis homojn kun aparte forta personeco. Homo, kiu estas psike tute sana, povas aliĝi al grupo tute eksternorma nur, se li aŭ ŝi havas tiel fortan personecon, ke li aŭ ŝi povas fronti al la amasoj kaj bazi sian starpunkton sur bazoj klaraj, seriozaj, elprovitaj, tiel ke li kapablas senti sin prava, tamen sen orgojlo. Feliĉe, da tiaj homoj troviĝis sufiĉe multe en la Esperanto-mondo ek de la komenco. Unu el ili, ekzemple, estis Edmond Privat. Ankaŭ al ili ni havas grandan ŝuldon, ĉar ili multe helpis progresigi la aferon, kaj iom post iom montri, en diversaj medioj, ke Esperantistoj ne estas nur stranguloj fanatikaj.

Kaj, klare, la du kategorioj havas intersekcion, t.e. homoj kun neŭrozaj trajtoj pli multaj aŭ severaj ol ĉe la averaĝa homo, sed ankaŭ kun pli forta personeco (ofte fortigita ĝuste per la konstanta devo ekzerci sin vivi en medio, al kiu oni ne sentas sin konforma aŭ plene adaptita).

Paradokso: kie estas mensa sano?

Ni do staras antaŭ paradokso: la Esperanto-mondo longe konsistis grandparte el homoj kun psika patologio, sed kiuj havis mense tute sanan pozicion pri lingva komunikado, dum la ĝenerala socio konsistas el homoj eble relative pli normalaj psike, sed kun tute neŭroza, patologa, mi eĉ dirus freneza, sinteno rilate al ĝi.

Kio ebligas fari tiel drastan aserton? Nu, la fakto, ke la socio prezentas ĉiujn simptomojn de psikopatolo-

gio en sia rilato al lingva komunikado. Kiam sentiĝas bezono, kion faras normalulo? Li agas por kontentigi la bezonon per la plej efikaj, agrablaj kaj rapidaj rimedoj. Imagu iun, kiu malsatas. Li havas en sia poŝo monujon plenan je monbiletoj. Li troviĝas en kvartalo kun multaj manĝaĵvendejoj kaj restoracioj. Se li estas normala, li iros en unu el tiuj, por serviĝi al si manĝon aŭ por aĉeti ion manĝeblan, kiu liberigos lin je la malsato. Kion vi opinios pri homo, kiu, anstataŭ tion fari, iras al la stacidomo, aĉetas bileton por trajnvojaĝo ĝis loko 300 kilometrojn for, kaj tie marŝas longe en la kamparo ĝis li atingas etan restoracion, kiu proponas nur malplaĉan manĝon? Kion vi opinios pri tia homo, kiu, pro sia stranga aliro al la problemo, malsatis dum horoj kaj fine ricevas ion ne tre kontentigan, kaj ĉio kostis centoble pli ol necesis? Ĉiu diagnozos tiun konduton kiel neŭrozan, patologican. Kial agi tiel komplike, sen profito por iu ajn, dum eblis solvi la malsatproblemon facile kaj rekte? En la kampo de lingva komunikado, Esperantistoj agas kiel la unua, la cetera mondo kiel la dua.

La ekzisto de rezisto konfirmas la diagnozon

Sed eble vi tamen havas dubon pri tio, ĉu la koncerna konduto vere estas patologa, kaj vi bezonas konfirmon pri la diagnozo. Nu, ni scias, ke unu el la karakterizoj de tiaj patologioj estas rezisto. La persono, kiu havas tiajn patologiajn trajtojn, faras ĉion ajn eblan por ne konscii, ke li aŭ

ŝi ne agas sane, ke ŝi aŭ li povus agi tute alimaniere, multe pli agrable kaj efike. Kelkfoje la koncernato tamen agnoskas, ke tia konduto estas nenormala, sed diras: „Jes, mi scias, ke tiel agi estas strange, nenormale, eĉ patologie, sed alimaniere mi ne povas fari”. Tiun rifuzon akcepti, ke la konduto estas nenormala, aŭ la neeblon ĝin ŝanĝi, oni nomas rezisto.

Nu, estas interese vidi, ke la maniero, laŭ kiu lingva komunikado estas organizita en nia mondo havas ĉiujn karakterizojn de patologia konduto. Esperanto ekzistas. Ĝi ebligas komuniki multe malpli multekoste ol samtempa interpretado, multe pli juste ol la angla, multe pli komforte ol iu ajn alia lingvo, kaj tio eblas post multe pli eta investo en tempon, monon kaj energion fare de la komunikantoj kaj fare de la ŝtato. Alivorte, ĝi estas la rekta vojo por kontentigi la bezonon. Sed anstataŭ uzi ĝin, la socio elektas tre komplikajn kaj multekostajn vojojn. Ĝi devigas milionojn da infanoj studi dum jaroj kaj jaroj fremdajn lingvojn tiel malfacilajn, ke nur unu el cent, meznombro, en Eŭropo, unu el mil en Azio, kapablas efike uzi la lingvon fine de la studoj. Post kiam estis investitaj tiom da penoj, da nerva energio, da tempo kaj da mono en tiun lingvoinstruadon, montriĝas, ke oni ne solvis la problemon de malegaleco, kaj ke oni tiel fuŝe atakis la lingvobariilojn, ke necesas investi ree milionojn kaj milionojn da dolaroj por pretigi tradukojn en dekojn da lingvoj kaj por prizorgi la samtempan interpretadon, sen kiu la komuni-

kontoj ne povus interkompreniĝi. Tio estas freneza. Estas freneze uzi sian tempon, sian monon, sian penon en tiel fuŝa, tiel neefika maniero, kiam eblas tion eviti. Jam per tio la socio montras sin patologia.

Sed kio konfirmas, ke temas pri aŭtenta psikopatologio, tio estas la fakto, ke, se vi atentigas pri la afero la ĵurnalistojn, la decidantojn, la gravulojn, la respondeculojn pri la organizado de la socia vivo, kaj provas vidi ĝin al ili, ke la sistemo estas freneza, kaj ke ekzistas mense sana maniero komuniki, multe pli facile atingebla, tiam vi estigas reziston. La homoj rifuzas konsideri vian atentigon, ili rifuzas esplori la aferon, ili forbalas la atestojn kaj la pruvojn, antaŭ ol konatiĝi kun ili. Tiu vorto „antaŭ” estas grava, ĉar ĝi estas la pruvo, ke la diagnozo estas ĝusta, ĝi atestas pri la rezisto. La respondeculoj de la socio preferas ne scii, ke ekzistas alia maniero komuniki interpopole, ol tiu, kiun ili trudis al la miliardoj da teranoj. Ili timas alfronti la veron. Kaj ĉar ili ne volas vidi, ke ili timas, kio estas plia pruvo pri la neŭroza, patologia karaktero de ilia konduto, ili uzas ĉiajn pretekstojn por ne malfermi la dosieron. La gravuloj do rifuzas ion ne sciante, ke ili rifuzas; ili timas nesciante, ke ili timas; ili kaŭzas embarason, maljustecon, frustron, kaj nenecesajn penadon, elspezadon, impostojn, komplikaĵojn ĉiaspecajn, kaj konsiderindan kvanton da suferoj (mi aludas i.a. al rifuĝintoj, por kiuj la manko de lingva komunikado ofte estas kaŭzo de tre konkretaj sufe-

Preskaŭ ĉio pri la prepozicio **POST**

Tiu ĉi prepozicio, logike kontraŭa al **antaŭ**, estas montranta:

1. Tempon pli malfruan, ol alia tempo. Ekz.: Mi redonos al vi la libron nur **post** dimanĉo (en iu tago post dimanĉo). Ŝi vizitos min **post** kelkaj tagoj. Li revenos hejmen **post** ĉirkaŭ tri semajnoj (pli frue aŭ pli malfrue ol post tri semajnoj). Lia patro mortis kelkajn tagojn **post** la malsaniĝo. **Post** la tagmanĝo mi sentis min dormema. Ebrieco pasas ĉiam **post** dormo. **Post** pluvego ofte aperas brila suno. **Post** vintro sekvas de nove printempo. La somersezono en Mielno komenciĝas **post** la dudeka de junio. Mi sendos al vi leteron nur **post** Kristnasko. **Post** nelonge (post nelonga tempo) okazos elektaj kunvenoj en ĉiuj filioj de PEA. Iom **post** iom ĉiuj konvinkiĝos pri granda valoro de Esperanto. Ni paŝo **post** paŝo, **post** longa laboro, atingos la celon en gloro (Z).

2. Lokon pli malproksiman rilate al tiu, kiu rigardas. Loka **post** egalas

roj), ili kaŭzas ĉion ĉi ne sciante, ke ili tion kaŭzas. Temas pri vere serioza, severa psikopatologio socia. Sed tre malmultaj personoj tion rimarkas kaj komprenas. (kontinuota)

do al **malantaŭ**. Ekz.: La ŝtono falis **post** lia dorso. Tre mallaŭte ŝi stariĝis post **la** kurteno. La najbaro malaperis **post** la pordego. Vespere la suno **post** la maro kaŝiĝis. En tiu ĉi arbaro vi povus erarvagi, do iru ĉiam **post** mi. Ŝi aŭdis **post** si brueton. La hundo rapide kaŝis sin **post** la muro. Pli ol dek belaj domoj troviĝas vice unu **post** la alia. Eble nia domo okupos lokon **post** ili. La prepozicio „da” **post** ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.

3. Rangon pli malaltan, ol alia. Ekz.: En la gimnazio vi estas la plej alta **post** mi. (La plej alta estas mi, sed **post** mi sekvas vi).

Rimarkoj:

a) Por eviti konfuzon inter loka kaj tempa sencoj de **post** oni povas uzi la pli precizan formon **post kiam** (de post la tempo, kiam). Ekz.:

Post kiam li alvenis, ni manĝis. (= Post lia alveno ni manĝis).

Ŝi malsaniĝis **post kiam** ŝi revenis hejmen. (= Ŝi malsaniĝis post la reveno hejmen). La kverelo komenciĝis, **post kiam** li foriris (post lia foriro).

b) Tempa **post**, same kiel tempa **antaŭ**, estas ofte uzataj en esprimoj de horo. Oni difinas la minutojn de 1 ĝis 30 per **post** kaj de 31 ĝis 59 per **antaŭ**. Ekz.: Estas dek minutoj **post** la oka; duono (kvarono) **post** (antaŭ)

la sepa.

c) Antaŭ **post** povas troviĝi iam la multsignifa prepozicio **de**. Ekz.: Mi ne vidis ŝin **de post** la tago, kiam ŝi forveturis al Londono.

De post la apero de Esperanto pasis jam 119 jaroj.

d) Rilate al tempo-punkto, **ekde** kaj **de post** estas samsignifaj: **de post** lia morto (= **ekde** lia morto); **ekde** lia morto (= **de post** lia vivo).

Vortfarado kun la prepozicio „post”

- **posta** (postea, pli malfrua, malantaŭa); Ekz.: La postan eldiron mi ne aŭdis. La posta parto de ŝia aŭto jam estas riparita.

- **poste** (post iom da tempo, pli malfrue, malantaŭe); Ekz.: Poste mi rakontos al vi pri ĉio, kio okazis. Antaŭe iris kantistoj kaj poste junaj kordinstrumentistoj.

- **posten** (celante plue al pli posta loko); Ekz.: Ni rimarkis, ke la polva nebulo fleksiĝis posten. Dum la promeno ŝi ofte rigardis posten.

- **postaĵo** (loke posta parto; parto kontraŭa al la fronto); Ekz.: La postaĵo de lia veturilo estis difektita dum ĉenkolizio.

- **posteulo** (tiu, kiu venas poste en tempo); Ekz.: Ĉiu generacio laboras por siaj posteuloj.

La prepozicio **post** funkcias ankaŭ prefiksoide.

postiri (iri post iu,io), postkuri, postrigardi, postsekvi, postsopiri, postrikolti, **postlasi** (lasi postmorte aŭ postforire post si), **postvivi** (ankoraŭ plu vivi post ies morto), **postgusto** (malagraba gusto, kiun lasas manĝo

aŭ trinko), postsigno, postkongreso, **postmorta**, postfesta, **posttabla** (postmanĝa), posttagmeze, **postmorgaŭ**, **postpostmorgaŭ** (tri tagojn post la nuna).

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio „post” el la Proverbaro Esperanta, prilaborita de Ludoviko L. Zamenhof:

- Post vetero malbela lumas suno plej hela.

- Post sufero venas prospero. Post domaĝo venas saĝo.

- Post dorma trankvilo venas bona konsilo.

- Post kolero venas favoro. Post konfeso venas forgeso.

- Post la falo oni fariĝas singarda. Post brua vento subita silento.

- Post la fasto venas festo. Post mia malapero renversiĝu la tero.

- Post morto kuracilo jam estas sen utilo



Saluton!

Mi invitas vin al la renkontiĝo kun Marzena Staniszevska kaj Wojtek Mysiara — esperantistoj el Toruń, kiuj revenis post trijara vojaĝado tra la mondo (ĉefe en Azio). La 10an de decembro je la 18.00 horo en Dwór Mieszczkański (strato Podmurna 4) ili rakontos al ni pri siaj impresoj, travivaĵoj kaj renkontitaj esperantistoj. Venu, rigardu fotojn kaj aŭskultu!

Amike

Kinga Nemere – Czachowska

La Movado

ARKONES: post la sukcesa aranĝo

Ĉi-jaraj, XXII jam „Artaj Konfrontoj en Esperanto” (Poznano, 29.09 — 1.10 2006), kiel kutime ne seniluziigis la partoprenantaron. De multaj jaroj la aranĝo famas, kiel unu el la plej bonaj en Esperantujo, kaj nune — ankoraŭfoje — sub stirado de Paweł Janowczyk, Zbigniew Galor, Zbigniew Kornicki kun gehelpantoj, ĝi pruvis, ke fartas tre bone kaj firme.

Densa, realigata paralele (duoble, parte eĉ trioble) programo, feliĉe pliriĉigita de lekciantoj de Esperantologia Studumo de Adam Mickiewicz–Universitato en Poznano kaŭzis neeblecon frekventi en ĉiuj programeroj. Do mencio–manko pri io ne signifas, ke programero estis malmenciinda...

Pro la sortaj kaŭzoj grava okazis la *Interparolo Kontrolata* — dediĉita al la forpasinta antaŭnelonge granda esperantista poeto kaj aganto William Auld. La gvidanto, d-ro Zbigniew Galor, bonŝance elpensis la formulon kaj konsekvence ĝin realigis. La invititaj personoj rememorigis proprajn kontaktojn kun la forpasinto, bildon de lia medio, ecojn de lia verkstablo kaj lian influon al la Esperanto–kulturo. Parolis Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Lidia Ligęza, Ljubomir Trifonĉovski kaj John Wells.

Pri literaturaĵoj oni povis aŭskulti

jenajn prelegojn: „Spertoj de beletra tradukado, aparte de ‘Sensorteco’ de Imre Kertés” estis priparolitaj de István Ertl. Pri „Pola, religia poezio en Esperanto” parolis Lidia Ligęza. Prezento de John Wells „Raymond Schwartz, kanzonisto kaj romanisto” plaĉis pro la supertempa humoro de la alfronta reprezentanto de pli leĝera, literatura, Esperanta Muzo.

„Margene de la estiĝanta, plena fi(k)vortaro — elpaŝo de Tomasz Chmielik — arigis multajn ĉeestantojn pro la konata elokventeco de la preleginto, atrakcia temo kaj la programo alskribo de organizantoj: „Nur por plenkreskuloj”.

Precipe ravigis min bele kaj precize pretigita, ilustrita per lumbildoj, prelego de Ranieri Clerici „Renesanco en Italio: karakterizaj trajtoj en arkitekturo, skulptoarto, pentroarto”. Alian belan arton, specifan kaj ĉarman, priparolis Ljubomir Trifonĉovski helpe de la teksto „Pup-teatra arto kaj Esperanto”.

Ne mankis rimarkoj pri muziko. Videofilmon „Kurso de hispanaj kantanĵetoj”, kun traduko kaj komentoj prezentis Augusto Casquero de la Cruz. Michel Duc Goninaz, utiligante sonbendojn, pianon kaj voĉon de sia edzino Arlette realigis trarigardon de

„Franclingvaj kanzonoj en Esperanto dum la XX jarcento”.

Psikologion Esperantlingve prezentis Jerzy Rządki. Sub lia subtila gvidado la 15-persona trejngrupo ekkonis arkanon de la „Komunikado sen perforto”. Evidentiĝis, kiel malfacile estas komuniki ion ajn, eĉ intence senigitan de agresemo, ne substrekante propran, la „unusole ĝustan” vidpunkton.

Nekutimajn travivaĵojn el spertoj de Esperanto-instruisto en Ĉinio montris Roman Dobrzyński, helpe de prelego kaj la filmo „Le eb Chinio?”.

Pri la „Esperanta slango” parolis Martin Minich, ne sen rimarkoj dum la diskuto, ke ankaŭ ĝi ne estas granda problemo, ĉar kiel ĉiu alia slango devas baldaŭ morti.

Unusolan teatraĵon „suben-tamen-traen-transen” prezentis Jarlo Martelmonto, ne la unuan fojon akceptante taskon ĵongli per Esperanta fonetiko, kiel la baza drammaterialo.

Klezmerajn kantojn kun propra akompano plenumis Irmgard Schneider, helpe de originala ludo-instrumento, simila al malgranda mandolino. Ŝatata Zuza Kornicka kantis kun gitaro kanzonojn, kies tekstojn plejparte verkis ŝia patro, Zbigniew Kornicki, unu el meritplenaj organizantoj de ĉiuj Arkonesaj aranĝoj. Per propraj baladoj kaj gajaj kantoj kun gitara akompano amuzis nin Jerzy Handzlik. „Esperanto-Desperado” kaj Amir Hadziahmetovic regalis nin per — ne plej mallaŭtaj — sed entute akcepteblaj sonoj.

La plej hela kanto-stelulo de la aranĝo okazis provanta ĉi-foje slavumi Jean-Marc Leclercq aŭ JoMo. Kun vera plezuro oni povis observi lian grandioze liberan, estradan sintenon, humorsenton kaj valorojn de la muzika plenumo.

Ni havis ankaŭ la okazon renkontiĝi kun deputitino al Eŭropa Parlamento — Margareta Handzlik, kiu pli frue partoprenis kune kun Michel Duc Goninaz, István Ertl, John Wells kaj Detlev Blanke la Konferencon „Lingva komunikado en Eŭropa Unio” (por neesperantistoj) en la A. Mickiewicz-Universitato.

Siajn atingojn prezentis sekve ankaŭ eldonistoj: Peter Baláž (Eldonejo Espero), István Ertl (Libera Folio), Ljumomir Trifončovski (Literatura Foiro), Halina Gorecka (Sezonoj, La Ondo de Esperanto), Kazimierz Leja (Hejme, Pola Esperantisto), Tomasz Chmielik (Libro-Mondo) kaj Jan Skonieczka (Skonpres).

Lecionojn el baza kurso de Esperanto gvidis Irmina Szustak.

La VII Oratora Konkurso je „tute libera temo” pruvis, ke ĉi-formo perdis sian allogecon. Kvankam ambaŭ oratoroj prezentis bonan nivelon, ili aliĝis apenaŭ duope. Eble valoras pripensi tute alian formon de la komuna distro.

Iomete da stranga eksterordinareco travivis ĉiu, kiu kuraĝis viziti programeron de Juliusz Wasik... ne... meriti gracon de la „Aŭdienco ĉe Lia Reĝa Moŝto, Reĝo de Vagabondoj, Julio I”.

Paralele al la ĉefa programo funk-

ciis kinejo, projekcia Esperantajn filmojn, liveritajn de la partoprenantoj. Gvidis ĝin Marek Blahuš.

Andrzej Sochacki montris sian foto-ekspozicion „Esperantaj aranĝoj”. Materialojn por ĝi la aŭtoro pacience kaj persisteme arigis ekde multaj jaroj.

Funkciis abunde provizita libro-servo, ĉefe el la trezoroj de la esperantista librovendejo de Paweł Janowczyk.

Bongustis medo, ricevita de Elżbieta Malik, trinkaĵoj kaj sandviĉoj en kafejeto de Oksana Janowczyk, ankaŭ dancoj en diskoteko aranĝita de junuloj el la Organiza Komitato.

Bedaŭrinde ne bongustis la primovada panel-diskuto „Estonteco de la Esperanto-movado en Pollando”, misgvidita de Ireneusz Bobrzak. Oni devas ege bedaŭri, ke ne estas jam inter ni Tadeusz Chrobak, kiu takto-plene, elegante kaj altnivele scipovis gvidi similajn panelojn. Mi restis kun la impresoj, ke junaj kaj ne ekstreme junaj anoj de la Esperanto-movado en Pollando vivas en ia eburaturo, el kiu ne intencas eliri, por ne infektiĝi je kvereloj de la olduloj. Ĉu iu emas demandi, pro kio la „olduloj” kverelas? Eble tamen pri io grava por ni ĉiuj? La nescio pri eventoj de la ĝeneralpola Esperanto-movado alkreskis al dimensio de la virto. Precipe paraliziga estis citita de la gvidanto konfeso de junulino, kiu en Nowy Sącz renkontis „oldulojn”, kiuj „tamen agas”! Bone, ke ili agas almenaŭ en mia gepatra urbo; aferon, ĉu agas ankoraŭ iu el miaj esperantistaj gea-

mikoj, konatoj kaj samideanoj kaj mi mem — mi devas ankoraŭ pripensi. Ĝis nun mi estis konvinkita, ke tamen jes. Sed, kia feliĉo por ĉiuj olduloj en Pollando. La pacama kaj konkordema junularo permesas al ni vivi, agi, verki laŭ elektita de ni maniero, kio estis klare dirite. Elkoran dankon.

Al la organizantoj de XXII ARKONES vortojn de la favora danko, kaj bondezirojn por iliaj laboroj super la sekva, simile abunda, diverstema aranĝo.

Lidia Ligęza

Miaj impresoj pri la prelego de Tomek Chmielik dum ARKONES pri „fi(k)vortoj”.

Ĉiujare dum ARKONES-aj prelegoj mi trovas iun „perleton” pri kiu, laŭ mia opinio, valoras rakonti al esperantistaro.

Antaŭ jaroj pola, ne plu vivanta esperantisto, Stanisław Świstak decidis kolekti fivortojn kaj eldoni eĉ la fivortaron. Li ne sukcesis fini sian verkon sed ekinteresis pri la afero aliajn kaj eblas, ke baldaŭ ni tamen havos okazon legi fivortaron.

Ĉiu vivanta lingvo posedas en sia vortprovizo vortojn, kiujn ne uzas diplomatoj kaj fakte mi ne dubas, ke ankaŭ Esperanto havas tiajn. Pasintjare Tomek Chmielik antaŭpromesis dum ARKONES 2006 prelegon pri „fi” kaj makiavele surloke „iomete korektis” temon. Iam li, sperta tradukisto, demandis Simo Milojević — longjara libroteniston de UEA — pri la plej

serĉataj temoj de libroj. Kompreneble SEKSECO — respondis ridante Simo kaj povas esti, ke estis li, kiu inspiris Tomek krei „fi(k)vortaron” kaj paroli pri ĝi en Poznań.

Spertaj esperantistoj scias, ke en Esperanto ekzistas vortoj por esprimi intimecon kaj amon sed ne estas facile kolekti ilin en la vortaro, ĉar la plej ofte ili estas vortoj–simboloj konataj nur de enamiĝinta paro.

Mi observis vizaĝojn de publiko kiam la preleganto legis amuzan ampoemon plena de „fikvortoj” kaj citis aliajn vortojn por priskribi intimajn partojn de vira kaj virina korpo, seksumado, ktp., tute sen vulgaraĵoj! Vangoj ruĝiĝis, kelkaj personoj nerveze strabis por ekvidi la reagon de najbaroj... Fakte, la prelego vere ne estis malbongusta, sed ni ne scipovas publike diskuti pri intimaj aferoj kaj eĉ la facileco, kun kiu la pereleganto „tuŝis” la temon evidentiĝis ŝoka por kelkaj.

Ĉu „interna intervjuo” ne estas pli bela priskribo de situacio ol simpla „seksumado”? Viaj partneroj invititaj „je intervjuo” certe sentos sin pli elegante... La aŭskultantoj petis Tomek antaŭvidi en la venonta vortaro ankaŭ „modelajn frazojn”, per kiuj legantoj povus ellerni korektan uzadon de tiuj specifaj vortoj. Do, ne maltrafu la momenton, kiam la „fikvortaro” estos eldonita kaj pliriĝigu vian vortprovizon ankaŭ en tiu ĉi sfero.

Ela Karczewska

UK 2009

Mallonga raporto pri la restaĉdo de la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller kaj de la KKS Clay Magalhães en Bjalistoko de la 8a ĝis la 10a de oktobro 2006, lige kun la invito de al la 94a Universala Kongreso de Esperanto en 2009

La 8an de oktobro 2006, dimanĉe vespere, al Bjalistoko venis la Ĝenerala Direktoro de UEA OSMO BULLER kaj de la KKS **Clay Magalhães** ivititaj de Fondumo Zamenhof kaj de la urbestro de Bjalistoko – Ryszard Tur, kiu financis iliajn restadkostojn en la plej bona en Bjalistoko hotelo „Branicki”, situanta ĉe la strato Zamenhof, 50 metrojn de la naskiĝloko de Ludoviko Lazaro Zamenhof.

La 9an de oktobro la gastoj havis jenajn renkontojn:

- kun la Kanceliero de Bjalistoka Teknika Universitato — sinjoro Grzegorz Zdanowicz, lige kun la vizitado de la studentaj domoj, la sporta centro (apud la projektita kongresejo) kaj la plej nova univeriata aŭlo por 700 homoj;

- kun la Kanceliero de Universitato en Bjalistoko — sinjoro Mirosław Puzyrewski, lige kun la vizitado de la plej nova en Bjalistoko Studenta Domo, ĉe la strato Żeromskiego, kaj de la nova universitata Giedrojć–Biblioteko;

- kun la Vicdirektoro de Bjalistoka Filharmonio — Lucyna Syty–Ptopopiuk, lige kun la vizitado de la funkcia Filharmonio kaj de ties koncertejoj kaj poste de la konstruolaco de la nova Filharmonio kaj Operejo

en Bjalistoko. En la Filharmonio dum dekkelkaj minutoj ni interparolis kun la Dua Sekretario de la Israela Ambasado en Pollando, kiu respondencas i.a. pri kulturo, kaj esprimis sian interreson pri Esperanto;

- kun la Direktoro de Bjalistoka Pupteatro — dro Marek Waszkiel, lige kun la vizitado de la Pupteatro. La direktoro, subtentate la ideon de la UK en Bjalistoko, esprimis sian volon prepari spektaklon en Esperanto (la teatro prezentis en 1988 en Rotterdamo esperantlingve la spektaklon *Dekamerono 8,5*);

- kun la Vicmarŝalo de la Podlaŝnia Vojevodio (vicprezidanto de la estraro de la regiono) — sinjoro Jan Kamiński (en la dua plej granda hotelo „Cristal”), kiu invitis nin al lunĉo kaj prezentis la investoplanojn de la vojevodio i.a. pri la regiona flughaveno (realigebla ĝis la duono de 2008), la nova sporta centro kaj kongresejo (supozeble realigebla ĝis la duono de 2009), realigataj kaj planataj aŭtovojoj kaj relinioj (la linio al Varsovio de Bjalistoko estas nun modernigata) kaj pri la preteco de la regionaj gvidorganoj subteni la ideon de la 94a UK en Bjalistoko. Sinjoro Kamiński transdonis regionajn E-donaĵojn al la gastoj;

- kun la Urbestro de Bjalistoko — sinjoro Ryszard Tur kaj la Vicurbestro — sinjoro Krzysztof Sawicki (kandidato por la urbestro en la novembro balotoj) kiuj substrekis la subtenon de la Urban aŭtoritatoj helpi okazigon de la UK en la jaro 2009.

Post la oficialaj renokontoj okazis

1-hora gazetara konferenco, en la Urba Oficejo de Bjalistoko, kiun partoprenis krome de la gastoj kaj de la subskribito, la direktoro de la kabineto de la Urbestro de Bjalistoko — sinjoro Waldemar Pawłowski kaj la prezidantino de Bjalistoka E-Societo — sinjorino Elżbieta Karczewska. Ĉeestis ankaŭ la sekretario de FZ — sinjorino Nina Pietuchowska kaj la prezidanto de la junulara E-klubo „Babelturo”, la sekretario de tutpola PEJ — Przemysław Wierzbowski. Dum la konferenco estis prezentita la ideo kaj la historio de la UKoj, la invito de la urbestro Tur sendita al la Estraro de UEA sendita la 31an de marto 2006 okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en 2009 en Bjalistoko kaj la impresoj de Osmo Buller pri la vizitado de Bjalistoko, kiel kandidato por la UK. La UEA-ĝeneralala direktoro substrekante multajn pozitivajn ŝanĝojn en la urbo post 1996 informis pri la mankoj de Bjalistoko (la kongresejo, la flughaveno). Li menciis ankaŭ la subtenon al Bjalistoko, kiel la proponata kongresurbo, flanke de D-ro L.C. Zaleski-Zamenhof, la nepo de la iniciatinto de Esperanto.

Post la konferenco okazis la vizitado de la spektaklejoj en la A. Węgieńko-Dramteatro kaj de la hotelo „Gołębiewski”.

Post la vizitado de la Historia Muzeo, kie i.a. estas la modelo de la 18-jarcenta Bjalistoko, la gastoj akompanataj de lokaj esperantistoj promenis tra la urbocentro laŭ la spuroj de Ludoviko Zamenhof, vizitante la Zamen-

hof Esperanto-Centron, ĉe la strato Piękna 3.

Dum la vespermanĝo en Nadawki apud Bjalistoko, laŭ la invito de la entreprenisto — Paweł Snarski, oni vizitis 300-kvadratmetran tendon, ĉar la bjalistokanoj proponas konsideri okazigon de la UK, kaze de manko de la granda kongresejo, i.a. en la granda tendo por 3 mil homoj, starigebla urbocentre aŭ sur la sportplacoj de Bjalistoka Teknika Universitato.

La gastoj forveturis per trajno al Varsovio la 10an de oktobro je la 8.05. Pri ilia vizito aperis ampleksa televida raporto en la regiona televido kaj 3 artikoloj en la lokaj gazetoj.

La decidon pri la kongresurbo de la 94a UK en 2009 la Estraro de UEA akceptos en 2006.

Raportis: Jarosław Parzyszek
Prezidanto de FZ-Estraro
Bjalistoko, 11-10-2006

Infanoj el Pollando malkovris Parizon kaj Belgion

Jam de kelkaj tagoj, la folkloro ensemblo „Modraki” aŭ „Cejanoj”, kvardeko da polaj geknaboj el la regiono Kociewie (Kocjevio), el urbo Pelplin (norda Pollando, sude de Gdansko), gvidataj de ges-anoj Jadwiga Wasiuk kaj Eduardo Kozyra, turneas en Belgio, vizitante lernejojn kaj aliajn kulturajn lokojn, i.a. Eŭropan Parlamenton. La tutan turneon de la „Cejanoj” en Belgio organizis s-ano Marcel Delforge (belgo el Charleroi,

legu: Ŝarlerŭa).

La Cejanoj koncertis ĉiam en Esperanto kaj la pola — en Bruselo: en la Eŭropa Parlamentejo kun ĉeesto de s-anoj laborantaj en la Eŭropa Registaro kaj en la Eŭropa Konsilio: Michael Cwik (germano) kaj Paulo Branco (portugalo), tie i.a. la himnon de Eŭropa Unio en Esperanto; en la kapelo de Katolika Centro dum la Sankta Meso kaj post ĝi (organizita de s-ano Guido Ricci — Ĝenerala Sekretario de Skolta Esperanto-Ligo); sur la Granda Placo kaj ĉe la „Pisanta Knabo”; en Charleroi apud la urbodomo kaj same la ilia spektaklo okazis en kvartala Kultur-centro dum la regalo fare de gesperantistoj — por ili kaj por kelkaj skabenoj de la urbo; en Amougies (legu: Amuĵi) — dum la Popol-festo de la Komunumo (tie oficiala akcepto ĉe la Urbestro de la Komunumo, kaj la sekvontan tagon aperis en la regiona gazeto tre favora artikolo pri la „Cejanoj” kun kolora foto) kaj dufoje en vilaĝo-urbeto Wodecq (tie konstanta bazo-tranoktejo de la pola grupo en pensionato) denove koncerto en la apuda lernejo — por la infanoj el kelkaj lernejoj de la ĉirkaŭaĵo kaj same en la pensionato — por la loĝantoj el





Wodecq (legu: Vodek). Krom la turisma vizitado de la supre menciitaj urboj la „Cejanoj” vizitis ankaŭ Brugion ŝipveturante tra la mezepokaj kanaloj de tiu „Venecio de Nordo”, kampojn de la Napoleona batalo ĉe Waterloo kaj la urbeton Flobecq (legu: Flobek).

Merkredon, la 6an de sept., ekveturinte je la 5a horo matene, ilia buso atingis ĉirkaŭ la 10a, la rendevu-lokon proksiman al Parizo. Tie atendis ilin d-ro François Lo Jacomo (doktoriĝo pri interlingvistiko en Sorbona Universitato); ano de Akademio de Esperanto (legu: Fransua, t.e. Francisko) kaj du aliaj samideanoj, por gvidi la ŝoforon tra nia ĉefurbo, al ĉefaj vidindaĵoj. Unue de la buso ili vidis Bazilikon de Sankta Koro (Sacré Coeur) kaj fine de la mateno, la buso haltis apud „Champ de Mars” kaj la gaja junularo paŝis ĝis la Eiffel-turo. Kvankam tio ne estis antaŭvidita, oni decidis montri sian spektaklon en tiom prestiĝa loko: piede de la Eiffel-turo! Eksonas fervoraj kantoj (parte en la pola lingvo, parte en Esperanto) kaj akompanas la viglajn dancojn. Multnombraj pasantoj haltas por ĝui la elstaran prezentadon.

Granda momento: grimpado per

la ŝtuparo, kaj de sur la plej en-Franco-fama monumento, malkovrado de la tuta urbo, sub brila kaj varma suno. Sed la tempo pasas rapide. La „Cejanoj” estas atendataj ĉe la Trokadero-placo, kie estas origine planita la spektaklo !

Post la necesega trinkad-paŭzo, ili transpasas la riveron Sejno per la lena ponto — belega, refreŝiga vidaĵo! — kaj paŝas tra la Trokadero-ĝardeno por atingi la Ŝajo-palaccon (palais de Chaillot). Inter la du partoj (aloj) de tiu belaspekta monumento konstruita en 1937, kiu entenas plurajn muzeojn kaj la nacian teatron, troviĝas granda kvadrata placo. En ĉiuj sezonoj, ĝi estas frekventata de turistoj (pro la fotinda panoramo), de suvenir-vendistoj kaj de homoj serĉantaj spektantojn por ĉiuspekaj elmontradoj: *kapuejro?*, hiphop-danco, biciklaj kaj sket-tabulaj akrobataĵoj, mimiko, „vivantaj statuoj”, ekzotaj muzikoj, ktp... Do, kial ne folkloro infan-junular-grupo?

Okazas renkonto kun la tie atendanta grupeto da esperantistoj. Interkonatiĝo, kaj denove, kuraĝe ekkantas kaj dancas la „Cejanoj”, antaŭ sufiĉe granda amasiĝinta publiko. La sukceson montras varmaj aplaŭdoj kaj mon-rekompencoj en la violonujo.

Grup-fotado, iom da ripozo, kaj ek! Al la buso! Fransua reprenas sian rolon de gvidanto, de buso li montris preskaŭ ĉiujn vidindaĵojn de Parizo (Sorbono, Panteono, Konkordo-placo, Luvro, la triumfarko de la Stelplaco kaj Elizeaj Kampoj — tie promenado kaj abunda fotado). La



lasta vizito celis la katedralon Notre-Dame de Parizo kaj tie denove kantas la „Cejanoj” sur la freŝnomita (ĵus antaŭ tri tagoj) la Placo de Johano Paŭlo la Dua (antaŭe la Placo de Notre Dame). Ankoraŭ la Placo de Bastilo kaj poste, venis la tempo por reverturi al Belgio, esperante alveni antaŭ noktomezo? Kaj postmorgaŭ reveturo al Pelplino kaj survoje, jam en Germanio ankoraŭ koncerto en la pola katolika preĝejo en Dortmundo por tie pola minoritato.

Elĉerpiga tago kaj la tuta turneo, certe, por la junaj gepoloj, sed jam dum la en-busa dormeto, kiom da belaj bildoj dancis en la kapoj! Kiom da neforgeseblaj travivaĵoj ili povos rakonti al familianoj kaj samlernejanoj. Lerninda lingvo helpis al konkretiĝo de tiu bela vojaĝo: Esperanto.

Elizabeta Barbay el Parizo

Pagu vian abonon por la jaro 2007!

Mendu librojn, eldonitajn de la Eldonejo HEJME, ĉar tiamaniere vi povas helpi novajn eldonajn iniciatojn.

Vizitu la Interreto-paĝojn de la Eldonejo: www.hejme.com.pl

Elsendoj de Pola Radio minacitaj!

En la Esperanto-redakcio de la Pola Radio oni kredas, ke la elsendoj en la plej malbona kazo povos ĉesi jam post kelkaj tagoj, fine de novembro. Gabriela (Gabi) Kosiarska, ĵurnalistino ĉe la Esperanto-redakcio, nun ricevis informon ke ŝi estos maldungita. Similan informon jam kelkajn tagojn pli frue, la 14an de novembro, ricevis Wojciech (Wojtek) Usakiewicz. Renato Corsetti vizitis la ambasadon de Pollando en Romo por esprimi sian proteston kontraŭ la planoj nuligi la elsendojn.

Al Wojtek Usakiewicz la 14an de novembro estis enmanigita kelkfrazo maldunga letero, kiu referencis al decido pri malfondo de la Esperanto-redakcio. Ankaŭ la oficiala dokumento pri la malfondo de la redakcio estis voĉlegita al li, sed malgraŭ lia peto oni ne donis ĝin al li en skriba formo, ĉar „temas pri interna dokumento de la radio”.

Tiun decidon la estraro de la Pola Radio laŭ la maldunga dokumento faris jam la 26an de oktobro. Ĝis nun la decido pri la malfondo ne estis oficiale konigita al la ĵurnalistoj de la Esperanto-redakcio.

Kelkajn tagojn poste simila maldunga letero estis transdonita ankaŭ al Gabi Kosiarska, la dua el la konstantaj kunlaborantoj de la Esperanto-Redakcio. Ĉar ŝi havas multajn neuzitajn libertemp-tagojn, la estroj de radio Polonia povos devigi ŝin forlasi la redakcion jam komence de de-

cembro. Tio praktike povus malebligi la daŭrigo de la elsendoj, ĉar mankos laborfortoj por prizorgi la redak-tadon.

Krom Gabi Kosiarska kaj Wojtek Usakiewicz, en la Esperanto-redak-cio konstante laboras nur ĝia estro, Barbara Pietrzak. Wojtek Usakiewicz devos foriri fine de februaro. Barba-ra Pietrzak ne ricevis averton pri mal-dungo, sed intertraktas kun la Pola Radio pri sia baldaŭa emeritiĝo kaj momente havas forpermeson.

Intertempe la prezidanto de Uni-versala Esperanto-Asocio, Rena-to Corsetti, turnis sin al la presiden-to de Pollando, Lech Kaczyński, pledante por la daŭrigo de la elsen-doj en Esperanto de Pola Radio. Pli frue Renato Corsetti jam skribis al la pola ministro pri eksterlandaj aferoj kaj al la direktoro de Pola Radio. Li ge kun transdono de la letero adres-ita al Lech Kaczyński, Renato Corset-ti estis akceptita en la ambasado de Pollando en Romo. Pri tiu vizito li rakontis en mesaĝo sendita al la komi-tatanoj de UEA:

— La vera surprizo estas, ke de la unua momento, kiam mi kontaktis ilin, ili estis tre pretaj fari sian eblon, unue por akcepti min rapide, kaj poste por kompreneme rilati al la afero. Evidentiĝas ke la pola Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, efektive informis la diplomatajn reprezentetojn eksterlande ke ili bonvolu kolekti la prote-stojn de esperantistoj kaj plusendi ilin tuj al Varsovio.

Tial Renato Corsetti petas, ke esperantistoj skribu al la pola am-

basado en sia lando kaj klarigu, ke daŭrigo de la elsendoj en Esperanto estas en la interesoj de Pollando, kiu tiel kreas al si multajn amikojn en la mondo.

— La mallongeco estas konsilinda, ĉar oni ĉefe kalkulas la nombron de la alvenintaj mesaĝoj aŭ leteroj. Oni iom hontigis min, ĉar el Italujo venis nur 5 protestoj, kaj 5 ne estas granda nombro en lando loĝata de dekoj da milionoj da homoj, li skribas.

Karaj Gesamideanoj!

Meze de la jaro ŝanĝiĝis la aŭto-ritatoj de la Pola Radio Akcia Kompanio. La laŭvican fojon ŝanĝiĝis la superuloj de ĝia Poreksterlanda Pro-gramo „Radio Polonia”. Relative longe ni ne konis la novan programan vizion de la publika radio kaj de Radio Polonia, kies programo estas realigata interkonsente kun la pola Ministe-rio por la Eksterlandaj Aferoj.

Hodiaŭ mi devas komuniki kaj in-formi, ke en tiu ĉi vizio forestas Espe-ranto-Redakcio. Ĝian forigon premi-sas la projekto de nova strukturo de Pola Radio, inkluzive de ĝia Poreks-terlanda Programo „Radio Polonia”. Cetere temas pri la unusola redakcio, kiu ĉesos ekzisti en Radio Polonia. La menciita projekto estis afiŝita sur la internaj retaj paĝoj de Pola Radio AK, marde posttagmeze, rekte antaŭ la komenciĝantaj festoj de Ĉiuj Sank-tuloj kaj la Mortintoj. Laborantoj raj-tas prezenti siajn rimarkojn al la pre-zidanto de la kompanio, K. Czabański ĝis la 10a de novembro.

La novaj radioaŭtoriattoj ekfunk-

ciis fine de julio nunjare. Jam dum la unua renkonto kun la superulo de Radio Polonia ni eksciis pri neceso kontraŭbatali „postkomunistajn influojn, regantajn en tiu programo de 16 jaroj”. Komence de oktobro la sama membro de la radiaj aŭtoritatoj signalis estontecan koncepton de nia programo. Laŭ ĝi al signifa plukonstruo subiĝos programoj en la ukraina kaj belorusa lingvoj, oni enpraktikigos instrukciadon de ĵurnalistoj el Ukrainujo kaj Belorusujo kaj por la ĵus menciitaj landoj, oni intensigos pollingvan emisiadon al ĉi tiuj landoj.

Fakte la lingva oferto de Radio Polonia estas difinata fare de la pola Ministerio por la Eksterlandaj Aferoj. En la lasta kontrakto el la nunjara majo Esperanto en ĝi troviĝas. Sed nun la radia projekto ekskludas ĝin. La situacio estas drameca, ĉar la ŝanĝoj estas efektivagataj en la lastaj tagoj fulmrapide. Oni ricevas la impreson, ke la nova administracio de la publika radio havas verdan lumon por ĉiuj siaj ideoj. Dum miaj provoj klarigi la signifon kaj atingopovon de niaj elsendoj, la viglajn reagojn el diversaj landoj de la mondo interparolante kun miaj novaj superuloj mi ricevis lakonan respondon „ni scias”. Mi estis ankaŭ informita, ke pri la estonteco de la E-Redakcio decidis Ministerio por la Eksterlandaj Aferoj. Ĉu tia decido estis efektive alprenita, mi ne scias.

Malgraŭ ĉio — ŝajnas al mi — ke ne eblas allasi, ke la eventuala malapero de esperantlingvaj programoj de PR restu seneŝa. Tial mi petas vian subtenon. Unuavice pere

de nacilingvaj korespondaĵoj direktataj al polaj ambasadoj, polaj kulturinstitutoj en diversaj landoj kun la demando pri la estonteco de la E-Redakcio de Pola Radio. Kun elmontrito de intereso por ĝia promociata rolo koncerne Pollandon, koncerne ĝian orientan politikon, kiu estas difinata kiel la orienta politiko de EU. Gravas — plurfoje esprimita — de niaj aŭskultantoj opinio, ke niaj elsendoj estas por ili unu el malmultaj aŭ eĉ unusola informfonto pri Pollando, ĝiaj atingiĝoj kaj progresoj, sed krome pri Belorusujo kaj Ukrainujo.

Ni bezonas ankaŭ similenhavajn leterojn adresitajn al la redakcio, por ke ili rolu kiel argumento en niaj rimarkoj, kiujn ni volas adresi al la prezidanto de PR ĝis la 10a de novembro nunjare.

Ne sufiĉas protesti, ne sufiĉas esprimi sian indignon. Estas necesaj sobraj, trankvilotonaĵoj argumentoj.

Kvankam malfacilas tion konstati, ŝajnas, ke nia redakcio dividos la sorton de aliaj E-redakcioj, kiuj malaperis en la lastaj jaroj en diversaj radiostacioj. Tio estas tutcerte frapo por la promociata rolo de tiuj ĉi elsendoj pri Pollando kaj ĝiaj transformiĝoj. Ĝi estas frapo antaŭtage de la 150a naskiĝdatreveno de la kreinto de la IL, d-ro L. L. Zamenhof — aparte en la kunteksto de la planta Jubilea Kongreso en la 2009.

Barbara Pietrzak
Esperanto-Redakcio de Pola Radio

Renato Corsetti skribis al la prezidento de Pollando

La prezidanto de UEA, Renato Corsetti, turnis sin al la pola prezidento, Lech Kaczyński, pledante por la daŭrigo de la elsendoj en Esperanto de Pola Radio. Pli frue Renato Corsetti jam skribis al la pola ministro pri eksterlandaj aferoj kaj al la direktoro de Pola Radio. Ni publikigas ĉi-sube tradukon de la pollingva letero, sendita al Lech Kaczyński. En sia letero Renato Corsetti atentigas la polan prezidenton, ke la nuligo de la Esperanto-elsendoj povus endanĝerigi la okazigon de la Universala Kongreso en Pollando en 2009. Li ankaŭ atentigas, ke pro la juda deveno de Zamenhof, iuj povus opinii nuligon de la esperantaj elsendoj manifestiĝo de antisemitismo.

Estimata Sinjoro Ŝtat-prezidanto, mi skribas al vi, kiel al la plej alta instanco en Pollando, pri afero eble ne plej grava inter viaj tutŝtataj problemoj, sed kiu malhavigus al Pollando valoran internacian informan rimedon, kaj povus eĉ kaŭzi damaĝon. Malgraŭ tio, ke vi mem skribis (en www.polskieradio.pl/polonia/eo) ke vi alte taksas la laboron de la eksterlandaj programoj de Pola Radio: „Honoran patronecon de la Prezidanto de Pola Respubliko super la solenaĵoj de la 70-jariĝo de Radio Polonia mi transprenis kun profunda konvinko pri granda signifo de la misio, kiun plenumas ĉi tiu meritiĝinta institucio”, ŝajne oni povus intenci forigi la dissendojn de Pola Radio en Esperan-

to, unu el la plej aŭskultataj dissendoj laŭ la statistiko de la korespondaĵoj de la aŭskultantoj.

Eventuala ĉesigo de la Esperantaj dissendoj de Radio Polonia povus esti interpretata kiel paŝo kontraŭ la libera esprimebleco kaj ankaŭ oni povus mise kompreni tiun decidon pro la juddeveno de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof, konsiderata granda filo de Pollando kaj rekonata de Unesko kiel personeco de la homaro.

Ĉi tiuj dissendoj produktas al Pollando multajn amikojn tra la mondo, ankaŭ ĉar Esperanto kaj Pollando estas ligitaj en la menso de la ĝenerala publiko en granda parto de la mondo. La forigo de la Esperantaj elsendoj estus perdo ne nur por la esperantistoj, sed ankaŭ por Pollando mem. Kiel vjetnamoj, japanoj aŭ usonanoj, por ne paroli pri pli proksimaj eŭropanoj, povas ricevi taŭgajn informojn pri Pollando? Des pli en la epoko de tutmondiĝo de la radioelsendoj per la reto! Pollando montriĝis avangarda, kiam ĝi kreis tiujn elsendojn.

Nun, dum ĝi havas pli kaj pli da ligoj kun eksterlando kaj integriĝas en Eŭropa Unio, ĝi povus survoji al paŝo malantaŭen. Por la tutmonda esperantistaro la ĉeso de la Esperantlingvaj elsendoj de Varsovio estas neimagebla, ĉar al nia movado apartenas homoj de opini-kreaj medioj (universitataj profesoroj, politikistoj, ĵurnalistoj, verkistoj kaj aliaj intelektuloj, eĉ Nobel-premiitoj), kiuj malgraŭ la profesiaj kaj sociaj taskoj regule

sekvas la elsendojn kaj utiligas ilian enhavon por siaj laborceloj, ĉar oni kopias tiujn dissendojn kaj utiligas ilin en kursoj de Esperanto aŭ eĉ en dissendoj de aliaj radiaj stacioj, ktp.

Krome, sinjoro Prezidanto, nia Asocio estis jam traktanta i.a. kun polaj esperantistoj kaj instancoj pri aranĝado de la ĉiujara monda kongreso de esperantistoj ĝuste en Pollando en la jaro 2009, 150a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. Ni ankoraŭ ne faris definitivan decidon. Sed estas evidenta afero, ke la plua aŭdigado de la elsendoj en la antaŭjubilea periodo havigus al Pollando pliajn amikojn kaj instigus al la partopreno en la jubileaj aranĝoj kaj aliaj konferencoj kaj kunvenoj kun la jubileo ligitaj. Ni certas, ke vi scios influi la kompetentajn instancojn, por ke oni evitu ĝuste nun senutilajn problemojn povantajn negative influi je la bildo de Pollando en la mondo kaj movojn, kiuj povus endanĝerigi la okazigon de la monda kongreso de esperantistoj (proksimume 3000 partoprenantoj) en Pollando en la jaro 2009.

Mi fidus je via juĝo kaj restas je dispono por pliaj informoj al viaj oficejoj kaj eventuale eĉ por vizito al ili por klarigi persone la situacion.

Estimata Sinjoro Prezidanto!

La tutmonda esperantistaro — pro la amika sinteno al la patrujo de Zamenhof — tre atente sekvis la evoluon de Pollando en la lastaj jardekoj kaj des pli nun, kiam Pollando pli kaj pli intime kunlaboras kadre de Eŭropa Unio. En ĉio ĉi gravan ro-

lon ludis kaj ludas rapida, findinda kaj bona inform-fluo. Tion certigas ĉiam plej efike radioelsendoj. Tial — en la nomo de la estraro de UEA kaj en la nomo de multnombraj amikoj de Pollando en la mondo — mi turnas min al vi, Sinjoro Prezidanto, kun la peto pri daŭra subteno de la Esperantlingvaj elsendoj de Pola Radio.

Respektoplene

Renato Corsetti
Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Fonto: Libera Folio kaj GK de UEA

Pola kulturo eksterlande

Wanda, Misiones, Argentino

Seminario pri pola kulturo en Wanda

Raporto pri la Esperanta Seminario: „Pollando — la patrujo de Ludoviko Zamenhof.

Tra la spuroj de la pola emigracio en Wanda”.

Ekde la 2a ĝis la 5a de Novembro okazis en Argentino, provinco Misiones, urbeto Wanda, internacia Esperanta seminario pri la pola kulturo. Mi organizis ĝin, ĉar nuntempe mi laboras en Argentino kiel instruistino de pola lingvo kaj kulturo kaj mi volis kunigi mian ĉiutagan laboron kun miaj interesoj rilataj kun Esperanto.

La organizado de la Seminario havis kelkajn ĉefajn celojn: doni la eblecon ekkoni la polan kulturon al la esperantistoj de diversaj landoj de Sudameriko kaj komenci kunlaboron inter ili per Esperanto en la spaco de

Interkultura Edukado.

En la organizado de la Seminario kunlaboris la Pola Ambasadego en Bonaero kaj membroj de Pola Asocio en Wanda, ĉefe lernantoj de la kurso de pola lingo kaj kulturo.

Unue ni timis iomete, ĉar ni ne certis, ĉu la evento estus interesa por esperantistoj de Sudameriko. Sed finfine aliĝis **33 homoj de 4 landoj**. El Brazilo venis 14 esperantistoj, el Urugvajo 1, el Argentino 17 kaj el Pollando 1.

Do la seminario fariĝis vere internacia kaj la aliĝintoj ne timis la sufiĉe intensan programon de la evento.

Inter ili estis kelkaj gravaj aktivuloj de diversaj esperantistaj kaj neesperantistaj asocioj:

Polo Angel — sekretario pri Turismo kaj Kulturo de la Urbodomo en Wanda, Roberto Sartor — membro kaj reprezentanto de la Komitato de AEL, Ruben Teofil Diaconu — membro de la Komitato de AEL kaj reprezentanto de la Esperanta Rondo en la Provinco Chaco, Felipe de Oliveira Queiroz — prezidanto de BEJO, Sandra Burgues — reprezentanto de la Urugvaja Ligo de Esperanto kaj ĵurnalisto de la Esperanta urugvaja radio „Radio Aktivo”, Maria Norma Jejer — prezidantino de Pola Asocio en Wanda.

La Seminarion partoprenis homoj kun diversaj celoj. Kelkaj venis, ĉar ili volis ekkoni tion, kion hodiaŭ signifas la pola kulturo, aliaj serĉis informojn pri polaj kutimoj kaj historio pri pola enmigrado en Argentino kiujn oni bezonas por iliaj universtataj laboroj.

Sed partoprenis ankaŭ esperantistoj kiuj simple ŝatis koni almenaŭ iomete pli la patrujon kaj la kulturon de la lando de Doktoro Zamenhof.

Kelkaj el la partoprenantoj jam delonge konis la historion de la pola enmigrado en Sudameriko. Ili havas kolegojn, amikojn kaj ankaŭ en iliaj familioj estas poldevenaj homoj. Do dank' al ilia jam antaŭa sperto ili povis aktive partopreni en diversaj paroladoj rilataj kun tiuj temoj.

La partoprenantoj agnoskis kiel la plej interesaj kaj gravaj partoj de la programo, la sekvajn eventojn:

Renkontiĝo kaj kunparolo kun polaj pioniroj kiuj alvenis tien antaŭ 70 jaroj kiel infanoj kaj fondis la urbon Wanda, La vizito en la Muzeo de la Pola Enmigrado, Lecionoj pri pola lingo kaj kulturo.

En la lasta tago ni skribis kaj akceptis la Deklaron de la Seminario, ĉar ni esperas, ke tiu evento ne estu unua kaj lasta, sed ni certas pri la daŭrigo de tiuj specoj de Esperantaj eventoj. Ni kredas, ke dank' al Esperanto ni havas bonegan ŝancon koni la kulturojn de la landoj de kiu venas aliaj esperantistoj kun kiuj ni renkontiĝas dum diversaj Esperantaj eventoj. Tiamaniere la mondo fariĝas pli malgranda, kaj la rilatoj inter esperantistoj, homaro pli fortaj.

Jen la Deklaro:

DEKLARO DE WANDA

Ni, la partoprenantoj en la Internacia Seminario esperantista de Wanda, Misiones, pri pola kulturo kaj Esperanto, memore de la polaj enmigrintoj al Wanda, subskribas

tiun ĉi deklaron:

***Ni firme aliĝas al la celo de la Esperanto–Movado pri la integriĝo de kulturoj fare de la neŭtrala lingvo Esperanto, aferoj pri kio ni plue lernis dum la Seminario.**

***Ni konsentas, ke estas grave por la esperantistoj koni la historion kaj kulturon de la pola popolo al kiu apartenis Ludoviko L. Zamenhof, kreinto de Esperanto.**

***Ni feliĉe rekonas la agadon de la Wandaj enmigrintoj kaj de iliaj posteuloj refere al la reviviĝo de la pola lingvo kaj kulturo, pere de Esperanto kiel internacia neŭtrala lingvo.**

***Ni deziras kaj proponas pliiĝi la kontaktojn inter esperantistoj de niaj proksimaj landoj en Sudameriko, por labori en la konstruado de vera komunumo de personoj marĝene de la merkosuda unio ekonomia kaj komerca, favorante novajn kunvenojn inter esperantistoj.**

***Ni restas tre dankaj al la komitato de la Wanda Pola Organizo, kiu frateme kaj sindoneme allogis nin dum la seminario, helpe de la loka municipa registaro kaj la Ambasado de Pollando.**

Kaj finfine ni volas gratuli la organizantojn, ĉefe Agnieszka Machota, pro la sukceso de tiu ĉi unua Seminario, kiu jam starigas Esperanto–Rondon en Wanda, kaj proponas ripeti tiajn ĉi kunvenojn.

Wanda, Misiones, en Argentino, la 5an de Novembro 2006

La organizado de la Seminario montris al mi, ke vere mankas internaciaj eventoj dediĉaj al la esperanti-

stoj kaj ankaŭ neesperantistoj, dum kiuj ili povus ekkoni polan kulturon, kutimojn kaj nuntempan vivon de la loĝantoj de la patrujo de Ludoviko Zamenhof.

Kiel organizantino de la Seminario post la fino de la evento mi povas nur esperi, ke la granda laboro kiun ni faris kune kun multaj esperantistoj kaj neesperantistoj influos al la pli granda kono de la pola kulturo inter la loĝantoj, ĉefe esperantistoj, de Sudameriko.

Ĝis la reveno dum la venonta interkultura evento!

Amike,

**Agnieszka (Ines) Machota
de Pollando**

Alian artikolon pri la Seminario, skribitan de Ruben Teofil Diaconu, vi povas legi tie:

www.esperanto.org.ar/eoael/html/

GRUPE — Gliwice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto

Por festi la GRUPE–10 (11–12.11.2006) venis pli ol 70 esperantistoj el kelkaj, ne nur eŭropaj landoj. Krom poloj, kiuj alvenis el diversaj partoj de nia lando venis ankaŭ: Bulgaroj, Ĉeĥoj, Slovakoj, Germano kaj Hispano. GRUPE partoprenis ankaŭ reprezentantoj el ekster Eŭropaj landoj — Senegalo, Niĝerio kaj Ĉinio.

Malfermon de la jubilea aranĝo partoprenis vic–urbestro Andrzej Karasiński kaj direktoro de Gliwicea Centro por Eksterregistaraj Organizaĵoj — s-ro Andrzej Gilner.

GRUPE–10 inaŭguris 120an datrevenon de Esperanto, kiun ni festos venontjare.

Partoprenantoj povis aŭskulti multe da interesaj prelegoj. Pri Esperanto en Senegalo kaj lingvaj problemoj de komunikaĵo en Afriko rakontis Abraham Langoume el Senegalo, Esperanton en ekologio prezentis prof. Bojidar Leonov el Karlovo en Bulgario, la ĉinan kalendaron prezentis sino Xiao Nan Xu. Pri Esperanto kaj kastanĵetoj rakontis, multfoje preleganta en Gliwice, Augusto Casguero el Hispanio

Belege eldonitaj CD-albumoj kun polaj tradiciaj kristnaskaj kantoj prezentis kantistino de Granda Teatro el Varsovio — Anna Osmakowicz. Partoprenantoj povis ankaŭ aŭskulti kelkajn erojn de ŝiaj albumoj. Krom tio oni povis vidi interesan filmon de red. Roman Dobrzynski „Ĉuvaŝa leciono” pri lingva festivalo en malproksima rusa regiono — Ĉeboksario.

Esperantan poezion, iom amuze, prezentis doc. Lidia Ligęza el Krakovo, kaj en Esperanta karaokeo kantis kun ĉiuj partoprenantoj de GRUPE — Waldemar Lipowicz.

Intereson inter partoprenantoj elvokis la noveldonita en Slovakio lernolibro por instrui Esperanton „Esperanto priamou metodeou” preparita kaj prezentita mem de la aŭtoro — Stano Marček. Krom libro estis prezentitaj modernaj aldon-helpmaterialoj por instruistoj. Interesa estas ankaŭ la fakto, ke jam oni preparas tradukojn de la libro en kelkaj aliaj lingvoj.

Dum GRUPE oni povis rigardi foto-ekspozicion ne nur pri pasintaj GRUPE, sed ankaŭ pri aliaj aranĝoj, preparitan de fama pola esperantista-fotisto Andreo Sochacki.

Partoprenantoj povis rigardi vidindaĵoj de la gastama urbo Gliwice gvidataj de lokaj esperantistoj, kaj en tre simpatia etoso travivi jubilean, jam dekan, GRUPE-aranĝon. Multaj partoprenantoj promesis veni denove venontjare.

Preparis: Stanisław Mandrak

Kontribuo de William Auld al Esperanto-teatro

Ekde 60aj jaroj William Auld komencis verki originalajn Esperanto-teatraĵojn. Tiamaniere li aliĝis al la pli fruaj dramverkistoj, kiuj signife riĉigis Esperanto-kulturon ankaŭ en tiu arta branĉo. Por tie nur memorigi lian teatraĵon „Kvazaŭ birdoj konstruas” prezentitan en la 70aj jaroj de la Teatro Esperanto en Parizo (TESPA).

William Auld ankaŭ okupiĝis pri tradukoj de teatraĵoj, ne evitante tiajn, kies tradukoj postulas majstrecon, kiel ekz. Ŝekspiran „Epifanion”, ĝis nun — laŭ mia scio — neniam en Esperanto surscenigita.

Liajn belajn, esprim-riĉajn poemojn ofte prezentis eminentaj aktoroj, kiel ekz. Nikolaj Rytjkov. Pluraj aliaj aktoroj riĉigis per liaj elstaraj poemoj koncertojn de Universalaj Kongresoj.

Jerzy Fornal enhavas en sia monodramo „Virino — kvar bildoj” lian priaman lirikaĵon. Ankaŭ alia lia prezento „Rimleteroĵ” baziĝas je verko samtitola, konsistanta el lia kun Marjorie Boulton poezia korespondado.

W. Auld riĉigis ankaŭ teatro-arton apartenante al la plej elstaraj verkintoj de valoraj raportoj pri teatraĵoj eventoj kaj analizoj pri pluraj teatraĵoj.

William Auld per sia verkado kaj amika apogo stimulis kaj riĉigis Esperanto-teatron, en tio funkciantan jam preskaŭ kvaron-jarcenton, teatron „Espero” de Jerzy Fornal.

Zofia Banet-Fornalowa

ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj — POLA SEKCIO — invitas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri progresado de Esperanto kaj pri E-instruado membrigi kaj/aŭ aboni la revuojn.

Kotizoj kaj abonoj 2007

LIMDATO: 30 novembro 2006

(por abonantoj de *Pola Esperantisto* limdato estas plilongigita ĝis la 16a de decembro)

Membrokotizo por 2007:

54 PLN — kun papera *Internacia Pedagogia Revuo*

18 PLN — kun elektronika *IPR*.

La membroj ricevas ankaŭ perrete mesaĝojn de la Novaĵservo de la Pola Sekcio de ILEI

Abono de *Juna Amiko* – 39,50 PLN

Ene: interesaĵoj, kantoj, ludoj, legaĵoj, ekzercoj, k.a.

Abono de *Scienca Revuo* — 49,50 PLN. Tre interesa, kvaronjara. Artikoloj el diversaj domenoj, bonegaj por riĉigi la vortprovizon de la leganto.

La kotizojn kaj abonpagojn akceptas per poŝtmandato:

Magdalena Tatara,
Koźmice Wielkie 323,
32-020 Wieliczka
tel. 012 651 74 79

Invito al koncerto de Kim Henriksen, en Krakovo

Internacia Centro de la Kulturoj en Krakovo kore invitas vin al la koncerto de la E-muzikisto Kim J. Henriksen el Kopenhago,

la 3an de januaro 2007, je la 18a horo, en la E-Teatro „Areno” (gvidata de

la aktorino Jadwiga Gibczyńska), en Krakovo, ĉe la strato Mikołajska 2 (ĵus malantaŭ la Sankta Maria-preĝejo — „Mariacki”), salono 17, dua etaĝo.

Senpaga koncerto por la ĝenerala publiko.

venu ĜUI BELAJN, VIGLAJN KANTOJN EN ESPERANTO!

Kim donos ankaŭ 1–2 aliajn koncertojn en Krakovo.

Maria Majerczak
dir. de ICK

Koboldajoj

En la pasintaj numeroj de PE kelkfoje la koboldo (vidu lian strangan foton!) instigis nin erari. Plej gravajn korektojn ni metas sube, petante samtempe ĉiujn legantojn sciigi la redakcion pri ĉiuj trovitaj eraroj aŭ mistapoj.

- En la 3/2006 numero de PE en la artikolo „En la intertempo de la du mondmitoj” aperis malĝuste skribita nomo de la aŭtoro. Devas esti: Jean AMOUROUX.

5a paragrafo de la artikolo devas komenciĝi: Fizike perfote mi ilin renkontis... (kaj ne perfoRte, kiel skribite).

10a paragrafo komenciĝas per:

— JK estis ĵurnalisto... Devas esti ‘juristo’.

Komence de la paĝo 14: — al la kunvenantaj anoj de la LKK... devas esti ‘LK’.

La aŭtoron kaj la legantojn ni kore pardonpetas.

- En la 5a numero de PE, la artikolo „Alia Venecio” estis skribita de Tomasz Chmielik (ne de Spomenka Stimeć, kiu tamen sendis la artikolon, unue aperitan en Kroatio). Denove ni petas pardonon!

